Ŝercoj

La hungarlingvan kolekton esperantigis

Geedzoj (Ladislao kaj Adrienne) Pásztor

- Traduko -



2016

Ŝercoj

La hungarlingvan kolekton esperantigis

Geedzoj (Ladislao kaj Adrienne) Pásztor

- Traduko -

Lingve kontrolis: Rob Moebeek kaj Pálma Csiszár

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Eldonrajto ĉe Redakcio de: www.viccesviccek.hu

La aperejo de la kolektaĵo ĉe:https://mek.oszk.hu/15100/15160/

La originalaj hungarlingvaj ŝercoj estas elektitaj el diversaj hungarlingvaj gazetoj
(Ekz: el ŝercoj de www.ludas_matyi.com, www.Kecskefeszek.net/vicces kep.hu, Megér egy mosolyt: www.keptelenseg.hu/cimke/vicces%20képek, http://www.viccesviccek.hu, http://ricsidoktor.hu/orvosi-humor.html, http://www.napivicc.hu/vicc.php?tipus=0, krome la presitaj enigmogazetoj: Füles-Skandi Rejtvényújság, Kacagó-Vicc-karikatúra-Rejtvényújság, Tapsi VICCES Zsebkönyv: www.viccestapsi.hu, k.s.)
kaj el inter humuraj historioj kaj dirаĵoj senditaj de niaj geamikoj.

Eldonrajto ĉe Redakcio de: www.viccesviccek.hu

La reeldono de ĉi kolektaĵo kaj alia uzcelo ol legado estas malpermesitaj
de la posedantoj de la ŝercgazetoj ĉi kolektaĵo ne kopieblas por komerca celo!

La rideto estas tiu lumo, kiu sur vizaĝe montriĝante anoncas,
ke la koro estas hejme.

Porkido

Maŭriceton admonas lia paĉjo:

- Fileto mia! Vi manĝas kiel porketo! Ĉu vi ne povas manĝi kiel homo?

- Sed jes.

- Ĉu vi scias entute, kio estas porketo?

- Jes, ĝi estas ido de la maljuna porko!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: Ladislao Pásztor, plue: L.P.)

Fakturo

La gasto post manĝado petas de la ĉefkelnero la fakturon.

Ricevinte ĝin li kontrolas la detalojn de la fakturo, poste kolere admonas la kelneron:

- Atentu, ĉi tiu fakturo ne estas bona!

- Pardonon, kara mia sinjoro! Vi pravas, ja erare mi adiciis al ĝi ankaŭ la hodiaŭan daton.

(Fonto de la kiel tradukbazo servanta hungarlingva teksto ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La pretendema gasto

- Kiom kostas ĉe vi unu ĉambro?

- Sur la unua etaĝo kostas 3000,- forintojn

Sur la dua kostas 2000,- forintojn

Sur la tria kostas 1500,- forintojn.

- Bedaŭrinde ĉi tiu hotelo ne estas por mi sufiĉe alta koncerne mian pretendon.

(Fonto de la kiel tradukbazo servanta hungarlingva teksto ne konatas.)
(-- Trad: Adrienne Pásztor, plue: A.P.)

Diskuto

En la vintrinkejo la amika societo jam sufiĉe ebrietis, kiam ili ekdiskutis, kiun beston indas havi en la loĝejo.

- Pli taŭga estas havi orfiŝon, ol hundon.

- Ĉu vere? - respondis iu hundamiko.

- Ĉu vi provis jam inciti orfiŝon al la rabisto?

(Fonto de la kiel tradukbazo servanta hungarlingva teksto ne konatas)
(-- Trad: L.P.)

Sovaĝa Okcidento

Vakeroj drinkadas ĉe la trinkeja vendostablo. Neatendite eniregas malgranda, maldika junulo kaj komencas kriegi:

- Kiu farbis blua mian ĉevalon?

Ekstaras larĝaŝultra, alta vakero kaj alpaŝas lin:

- Mi. Ĉu vi volas ion alian?

La malgrandulo ektimas, retroiras kelkajn paŝojn, poste ekparolas:

- Nur tion mi volis diri, ke la farbo jam sekiĝis, vi povas vernisi.

(Fonto de la tradukbazon donanta hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Urborigardantoj atentu!

La aŭtobuso de la turisma servo ekveturis por ĉirkaŭveturi en la fama urbo. Unue estis rigardata restoracio fama pro la vinoj. Poste estis vizitataj la modernstilaj ĉambroj de la alkohol-sentoksiga instituto...

(Fonto de la tradukbazon donanta hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La burokrato

Estimata bandito! Mi transdonas mian monon pro viaj gravegaj argumentoj, tamen nur se vi bonvolas doni al mi stampitan kvitancon.

(Fonto de la tardukbazon donanta hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(--Trad: L.P.)

Familia idilio

- Panjo, la paĉjo hejmenvenis jam denove plenebrie el la drinkejo.

- Kial vi diras ĉi tion, mia fileto?

- Tial, ĉar li komencis razi la spegulon en la banĉambro.

(Fonto de la tradukbazon donanta hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La rapideco

Iu viro rapidegas per sia nova aŭto. Policisto haltigas lin:

- Ĉu vi ne legis la rapidolimigan tabulon?

- Kio? Ĉu tio legeblas je ĉi tia rapideco?

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

La ĝirafo

- Kion faras la ĝirafo se iu kraĉas en ĝiajn okulojn?

- Ĝi elpuŝas la eskalon de sub tiu homo!

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

Dilemo

La ebriulo cerbumadas en si mem ĉe botelo da vino:

- Ĉu mi drinku? Aŭ ne? Mia stomako diras, ke mi drinku. Sed mia cerbo diras, ke mi ne drinku. Estas evidente, ke mia cerbo estas pli saĝa, ol mia stomako kaj ĉar ĉiam la pli saĝa estas pli cedema, ol la malsaĝa, tial estos pli bone, se mi drinkas.

(Fonto de la tradukbazon donanta hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La tunelo

Du ebriuloj vojaĝas en vagonaro. Ili dezirus drinki plu, sed en la bufedo aĉeteblas nur mineralakvo. Ili devas aĉeti unu botelon da tio. Unu el ili ektrinkas glutegon el la trinkaĵo kaj subite la vagonaro kuras en tunelon.

- Nu, kia ĝi estas? - demandas lia kunulo.

- Ne trinku el ĝi! Mi jam blindiĝis.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

Okulmalsano

- Kial lamadas vi, Kolomano?

- Ĉar mi estas miopa.

- Eĥ ne ŝercu, neniu lamas pro miopo!

- Sed ĉi tio estas vere tiel!

- Hieraŭ vespere en la drinkejo mi vidis malbone kaj provokis iun ulon, kiu estis multe pli forta ol mi.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

Bongustaĵo

- Ĉu ĉi tiu via helikpasteĉo estas vere el heliko?

- Jes.

- Kaj ĉu nur el heliko?

- Do, nun kiam vi demandis, mi konfesas sincere, ke ni enmetas ankaŭ porkviandon.

- Kiom?

- Duonkvanton el ambaŭ: unu kilogramon el helikoj, unu kilogramon el porkviando.

(Fonto ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La morto

Virino malfermas la pordon por aerumi, poste ekkriege malantaŭen saltas. Sur la sojlo staras 20 centimetrojn alta Morto. Ĝi vere samas, ĝi havas: falĉilon, kapuĉon, senvizaĝecon.

La estaĵo ekparolas:

- Trankviliĝu! - mi venis nur pro la kobajo.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Teokuirejo

La domposedanto montras iun etan loĝejon al la subluon serĉanta juna geedza paro:

- Mi konas viajn pensojn kaj vi pravas. Fakte la kuirejo tre etas, sed trankviliĝu: se vi pagos la lukoston, poste vi ne havos monon por kuirado!

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

Uragano

Du eksedzoj paroladas:

- Ĉu vi scias, kio estas la diferenco inter la virino kaj la uragano?

- Ne. Kio ĝi estas laŭ vi?

- Nenio. Ambaŭ alvenas neatendite, dum foriro forportas la tutan domon.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

Plendo

Sinjoro Szoboszlai (soboslai) en la restoracio post la tagmanĝo venigas al si la posedanton kaj ekplendas:

- Sinjoro, vi havas terurajn kelnerojn.

- Mi tre ĝojas pro tio, kara gasto!

- Kial vi ĝojas pro tio ĉi?

- Finfine iu estas, kiu plendas ne pro la manĝaĵoj.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Konata situacio

Iu sinjoro treege ebriiĝis en la drinkejo. Ŝanceliĝadante elpaŝas li tra la pordo de la drinkejo, alpuŝiĝas al iu virino, kiu donas al li fortegan vangofrapon.

La drinkulo ekkriegas mirante:

- Hu ha, kiel rapide mi hejmenalvenis!

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Lumbriko

- Ĉu ni manĝas teron? - demandas la eta lumbriko sian panjon.

- Jes, mia fileto.

- Diru, panjo, ĉu estas el ĝi sufiĉe?

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Atestanto

- Petro demandas sian amikon:

- Ĉu vi estos mia atestanto dum mia geedziĝa ceremonio?

- Kial ne? Vi scias, ke mi enestas ĉiun frenezaĵon.

(Fonto: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La etulo

Ĉe la ruĝa trafiklampo atendadas unu apud la alia kamiono kaj eta Polski Fiat. La ŝoforo de la kamiono demandas la virinon kondukanta la etan aŭton:

- Diru, ĉu vi ankoraŭ sucigas la etulon aŭ ĝi jam konsumas ankaŭ benzinon?

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

La miro

- Sinjorino Kovács tre malbele interkverelas kun sia ebria, interbatiĝema edzo, pro kio poste ŝi iras al la pastro por peti konsilon.

- Bonvolu hejmeniri! - diras al ŝi la pastro - vi ekvidos, ke ĉio reboniĝos.

La sinjorino hejmeniras. En la domo la edzo ne hejmestas, sed anstataŭ li ŝi trovas sur la tablo papereton kun la sekva teksto:

- „Mi tediĝas de vi, ulino! Mi translokiĝos, kaj neniam revenos”.

Sinjorino Kovács reiras al la pastro kaj dankegante diras al li:

- Mi dankas vin, mia pastro. Ĉio okazis tiel, kiel vi diris.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

La naskiĝtaga donaco

La edzo diras al sia amiĉjo:

- Mi ne scias, kion mi aĉetu okaze de la naskiĝtago de mia edzino, nome ŝi havas ĉion kaj povas aĉeti ĉion, kion ŝi deziras.

- Donu al ŝi paperfolion, sur kiun vi skribu la sekvan: „Ĉi tiu skribaĵo rajtigas vin por fari unuhoran seksan laboron."

La edzo faras tiel. Sekvatage la amikoj denove renkontiĝas.

- Nu, ĉu la donaco estis sukcesa? - la amiĉjo demandas.

- Jes. Kiam mi transdonis al ŝi la donacon, ŝi eksaltis, trabrakumis min pro ĝojo, kisis mian frunton kaj forkuregis. Sed dume ŝi kriis al mi: „Mi estos ĉi tie post unu horo!"

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Konstatado

La geedziĝo estas simila al la politika elekto: Kiun ajn vi elektas, la rezulto estos malbona.

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kreado

Dio kreis la Universon kaj vidis, ke ĝi iĝis bela.
Dio kreis la Teron kaj vidis, ke ĝi iĝis bela.
Dio kreis la Naturon kaj vidis, ke ĝi iĝis belega.
Dio kreis la bestojn kaj vidis, ke ili iĝis belaj.
Dio kreis la viron kaj vidis, ke tiu iĝis bela.
Dio kreis la virinon kaj diris: „Nu, la krea eraro ne gravas, ja ŝi plibeligos sin."

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

La oscedanta edzo

Jam ekde duonhoro plendas sinjorino Szabó al sia amikino kaj ja tiel ŝajnas, ke ne elĉerpiĝas la vortoj.

- Nun ankaŭ vi povas vidi, kiel strange kondutas mia edzo. Min tre ĝenas ke kiam mi komencas paroladon kun li, li tuj ekoscedas.

- Ĉu vi ne pensis ĝis nun, - demandas la amikino - ke li ne oscedas, sed volas diri ion?

(Fonto de la tradukbazon donanta hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Embarasaj cirkostancoj

Dum la ginekologia ekzameno la medicinstudento - kiu estas fama virindeloganto - devas esplori iun pacienton, sed treege mallerte komencas la agadon. La universitatajn klaĉojn bone konanta profesoro ekridante ordonas:

- Kurtenumu la fenestrojn, elŝaltu la lampojn!

Verŝajne la kolego en lumo ne povas orienti sin.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Trompiĝo

La edzo iras seneme hejmen, ŝajne mishumore. Li vespermanĝas, drinkas unu glason da vino, poste enlitiĝas apud sian edzinon kaj komencas karesi ŝin.

- Karega mia, - flustras la edzino - hodiaŭ ne eblas...!

- Tion ĉi, mi ne komprenas - grumblas la edzo - ĉu hodiaŭ ĉiuj virinoj interkonsentis?

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La direktoro

La direktoro de hotelo diras al la kelnero:

- Kial vi disputas kun la kliento? Ĉu vi ne scias, ke la kliento ĉiam pravas?

- Sed la kliento diras, ke vi estas ŝtelisto.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Terura

Du homoj paroladas en drinkejo.

- Terure, kiel mi vivas! Mia edzino ĉiuvespere vizitas drinkejon.

- Kial vi ne eksedziĝas?

- Maleblas. Tiukaze kiu akompanus min hejmen?

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kiu komprenas?

Kiu komprenas, ke la virinoj vestas sin per pantalono por pli simili al la viroj, sed ili surprenas ankaŭ diafanan bluzon por demonstri, ke ili ne estas tiuj.

(Fonto: Rejtvényújság / hungarlingva Gazeto de Enigmoj)
(-- Trad: L.P.)

La tagmanĝo

Fajnaj manĝaĵpecoj atendas la novedzon hejme.

- Kion vi kuiris hodiaŭ, karulino?

- Mi ne scias, ĉar la etikedo degluiĝis de la konservskatolo.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Ĉu pagite?

Foje iun matenon, la direktoro eniras en la kontoron kaj tie li trovas suban ĉefon interkisanta ĝuste tiam kun la sekretariino. La direktoro krias indignante:

- Geza, ĉu mi pagas vin por fari ĉi tion?

- Ne, sinjoro, mi faras tion tute proprakoste.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La trinkaĵo

Kvar homoj sidas ĉirkaŭ tablo. Botelo estas sur la tablo. La unua homo prenas la botelon, trinkas el ĝi, poste metas ĝin sur la tablon. Ankaŭ la dua homo prenas ĝin, trinkas el ĝi, poste remetas ĝin sur la tablon. Ankaŭ la tria faras same. Ankaŭ la kvara homo trinkas el la botelo, metas ĝin sur la tablon kaj alparolas:

- Ĉi tio estas petrolo!

La unua homo rigardas ĝin kaj alparolas:

- Jes, tio estas.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kaŭzo de la malfruiĝo

Maŭreto malfrue alvenas hejmen el la lernejo. Lia paĉjo severe pridemandas lin pro la malfruiĝo. Je tio li respondas:

- Iu oĉjo perdis sur la bulvardo centforintan bankbileton kaj nur nun li trovis ĝin.

- Kian rilaton vi havis pri tiu mono?

- Mi staris sur ĝi.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La malsanulo

Iu ŝoforo pro kolizio senkonsciiĝis. Li rekonsciiĝis nur sur hospitala lito. Li ĉirkaŭrigardis kaj nebulmense demandis:

- Kie mi estas?

- En la dektria - diras la flegistino.

- Kio estas ĉi tiu dektria? Ĉu ĉelo aŭ hospitala ĉambrego?

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La kuracisto

Virino mezaĝa vizitis la dermatologon:

- Tre jukas mia mankavo - diris ŝi.

- Kiu?

- La dekstra.

- Se la dekstra, vi elspezos monon.

- Bonvolu ne ŝerci.

- Do, bone, bone. Kaj ĉu ĝi havas ankaŭ humidiĝan kapablon?

- Ne.

- Tiam, ne nerviĝu. Okazas nenia malbono, ja ĝi estas nur ludo de la maljuniĝanta haŭto. (La ŝajne ŝerca historio vere okazis. Mi havis gravan ekzemon, nur tiu kuracisto ne rekonis la malsanon.)

(Fonto de la hungarlingva originalo: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

Ĉe psikiatro

La psikiatro demandas la malsanulon:

- Kio okazus, se mi detrancus vian maldekstran orelon?

- Mi ne aŭdus.

- Kaj tiam se mi detrancus ankaŭ vian dekstran orelon?

- Mi ne vidus.

- Kial?

- Ĉar falus miaj okulvitroj.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Nesatigebla sci-soifo

La instruistino renkontas la patrinon de iu sia instruato:

- Sinjorino, mi gratulas vin! En via filo estas nesatigebla sci-soifo. De kiu li heredis ĝin? Ĉu de vi aŭ de via kara edzo?

- De ni ambaŭ. La scion de mi, kaj la nesatigeblan soifon de sia patro.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Dilemo

- Unu el miaj filinoj edziniĝis en la urbon Szeged, la alia en la urbon Pécs. Al kiu mi iru loĝi?

- Nu, kion opinias pri tio viaj du bofiloj?

- Tiu en Szeged proponas Pécs-on, kaj tiu loĝanta en Pécs proponas la urbon Szeged.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kverelo

La geedza paro kverelas.

- Notu bone, ke tiuj, kiuj antaŭ vi amindumis min, estis senescepte pli saĝaj, ol vi!

- La edzo: Tio veras. Ja, mi edzinigis vin...

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Sur ŝnurego de helikoptero

Iutage dekunu homoj pendis sur ŝnurego de helikoptero, dek viroj kaj unu virino.

Ĉar la ŝnurego ne estis sufiĉe forta, ĝi ne povis teni la dekunu homojn. Ili tiel decidis, ke unu persono devas salti malsupren, kontraŭe ĉiuj mortos. Ili ne povis konsenti pri la persono de la viktimo.

Subite la virino diris iun mallongan, sed emocian parolon, ke ŝi estos la viktimo, ĉar la virinoj alkutimiĝis al tio, ke en la interesoj de siaj filoj kaj edzoj, ili rezignu pri ĉio. Fine de ŝia parolo ĉiuj viroj komencis aplaŭdi...

Instruaĵo: Neniam estas permesate subtaksi la potencon de la virinoj...

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La glaso

- Jean, kial vi trinkas el malplena glaso?

- Mi ne estas soifa, sinjoro mia.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La pozitiveco

- Nu, mi povas diri unu pozitivan aferon pri mia infano.

- Kio ĝi estas?

- Nome, rigardante ties kvalifikojn, mi estas certa, ke tiu ne kutimas kaŝkopii.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Helpopeto

Iu maljuna onjo, portanta fortan dioptrion en la okulvitroj, alparolas infaneton sur la strato:

- Infaneto, ĉu vi povas helpi min por trairi sur la alian flankon de la strato?

- Volonte. Ĉu vi loĝas tie?

- Ne. Tie estas mia aŭtomobilo.

(Fonto: la presita tagĵurnalo Észak Magyarország)
(-- Trad: L. P.)

Trafa respondo

Komence de la 20-a jarcento okazis, ke iu knabo, lernanto, demandis sian patron:

- Ĉu veras, ke ni devenas de la simioj?

La patro, surprizite, metis flanken la gazeton. Iomete li pensadis, poste firme respondis.

- Mi neniel, sed vi certe jes!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La terpomo

Maljuna araba homo loĝas jam pli ol kvardek jarojn proksime de Nov - Jorko. Li dezirus planti en sia ĝardeno terpomojn, sed li estas sola, maljuna kaj malforta. Lia filo studas en Parizo. Li skribis al tiu mesaĝon:

- Kara mia filo, Ahmed!

Mi estas treege malgaja, ĉar mi ne povas planti en mia ĝardeno terpomojn. Mi estas certa, ke vi povus helpi, se vi fosus la grundon de la ĝardeno.

Mi amas vin: Via patro.

Sekvatage la maljunulo ricevas mesaĝon de sia filo.

- Kara mia patro!

Ne iru al la ĝardeno. Mi kaŝis tie la „aĵojn”. Ankaŭ mi amas vin: Ahmed.

Sekvatage tagiĝe je la 4-a horo la militarmeo, FBI, CIA, policistoj kaj la oficejo de Sekureco kuratakas la domon de la maljuna araba homo. Ili traesploras la tutan domon, fosas la ĝardenon, sed trovas nenion. Poste matene ili foriras trompiĝinte.

Sekvatage la maljunulo denove ricevas retleteron de sia filo.

- Kara mia patro!

Mi esperas, ke nun jam la grundo de via ĝardeno estas fosita kaj vi povas planti tien terpomojn. Mi bedaŭras, ke nur ĉi tiel mi povis helpi vin.

Mi amas vin: Ahmed.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La fiŝkaptisto

Iu homo fiŝkaptadas kun kruro gips-bandaĝita sur la riverbordo.

Iu promenanto demandas lin:

- Ĉu la fiŝoj mordas?

- Ne, mi nur falis - respondis la demandita.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.minap.hu)
(-- Trad: A.P.)

La kamparano kaj la azeno

Iutage la azeno de kamparano falis en la puton. La besto dum horoj blekis kompatinde, dum la kamparano pensadis: Kion fari? Fine li tiel decidis, ĉar la besto jam estas maljuna, kaj la puton li volis nuligi, pro tio li ne savos la azenon. Li vokis siajn najbarojn por helpi lin. Ili komencis ĵetadi teron en la puton per ŝoveliloj. La azeno perceptis la kaŭzon de la faro kaj komencis hurli teruriĝante. Pli poste ĝi silentiĝis. Post iom da tempo la kamparano rigardis en la puton. Li surpriziĝis, ĉar li vidis, ke la azeno vivas, kaj la en puton metitan teron ĝi mirinde deskuas de si mem kaj staras sur la supron de la tero. Kiel la najbaroj ŝovelis la teron en la puton, la azeno deskuis de si mem la teron kaj paŝis ĉiam pli supren. Baldaŭ la azeno saltis el la puto - je ĉies miro - kaj feliĉa foriris!

La vivo ŝovelos sur vin ĉiuspecan malpuraĵon, teron. La truko de la grimpado el puto estas, ke vi deskuu de vi mem la malpuraĵon kaj faru unu paŝon. Ĉiuj problemoj estas unu pli nova eblo por paŝi plu. Ekzistas solvo el kia ajn problemo, se vi ne rezignas kaj ne haltas! Skuu vin mem kaj faru unu paŝon pli supren!

(Kiel fonto, servas hungara fabelo el elementlerneja lernolibro)
(-- Trad: L.P.)

La pruvo

Du sucĉinfanoj paroladas en la klaso de la novnaskitoj:

- Ĉu vi estas knabino aŭ knabo?

- Knabo.

- De kio vi scias?

Se foriros la flegistineto, mi montros al vi.

Post kelkaj minutoj la flegistineto foriris kaj la knabeto suprentiris sian kovrilon:

- Vidu, miaj ŝtrumpetoj estas bluaj!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La kunvivo

- Mia filino! Francisko petis vian manon kaj mi donis vin al li! - informas la felića patro.

- Sed mia paĉjo! Mi ne povas forlasi mian panjon! Mi volas vivi kune kun ŝi!

- Tio ne estas problemo. Portu kun vi mem ankaŭ vian panjon!

(Fonto de la hungarlingva originalo: - Észak Magyarország - titola presita tagĵurnalo)
(-- Trad: L.P.)

La ĉevalforto

Maljunulo progresas malrapide survoje kun duĉevala ĉaro. Apud li haltas junulo kun fajroruĝa Ferrari-aŭtomobilo.

- Kiom da ĉevalfortoj havas via ĉaro? - demandas la junulo.

- Du.

- Kaj la via? - redemandas la maljunulo.

- 500 - respondas la junulo fiere, kaj subite ekrapidas.

Post iom pli ol duonhoro, la maljunulo sur la ĉaro alvenas al granda vojkurbiĝo kaj vidas, ke la aŭtomobilo de la junulo estas falinta en kavon.

- Hej, kio okazis, mia filo? Ĉu diskuris la ĉevalaro?

(Fonto: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: L.P.)

Konsilo

Iu masivkorpa viro sidadas antaŭpreĝeje kaj almozpetadas. Piediranto admonante demandas:

- Ĉu vi ne hontas? Vi estas forta homo kaj povus labori!

- Sinjoro! - respondas la almozulo. - Mi petis de vi kelkajn forintojn kaj ne konsilon!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Medikamento

La kuracisto preskribas pilolojn al skoto. Tiujn vi devas preni dum kvin tagoj ĉiam post la vespermanĝo.

Dum la sesa tago la kuracisto iras al la malsanulo.

- Ĉu vi prenas la pilolojn?

- Nur du pilolojn - respondas la skoto.

- Kial nur du pilolojn?

- Ĉar dum tri tagoj mi ne vespermanĝis.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La aŭdo

Iu homo vizitas la orelkuraciston kaj plendas, ke li malbone aŭdas.

- Kiam vi spertas tion? - demandas la kuracisto.

- Ekzemple, mi ne aŭdas mian tusadon.

La kuracisto preskribas medikamenton kaj la recepton donas al la paciento.

- Ĉu mi aŭdos pli bone pro tiu medikamento ol antaŭe? - demandas la paciento.

- Ho, ne - diras la kuracisto - sed de ĝi vi tusos pli laŭte ol antaŭe.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La eta malbono

La kuracisto ekzamenas iun mezaĝan sinjorinon, kaj li diras al tiu la diagnozon:

- Via koro estas malforta. Vi havas iomete koronarion kaj via EKG montras cirkuladan perturbon. Kiomjara vi estas?

- Tridek sep.

- Hm, ŝajnas al mi, ke ankaŭ pri la memorkapablo estas iom da problemoj.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La lernanta ŝoforo

Ĉe la benzinstacio lernanta ŝoforo haltigas la aŭton por plenigi la benzinujon. La laboristo de la benzinstacio avertas la lernantan ŝoforon:

- Kial vi ne haltigas la motoron, se vi volas plenigi la benzinujon?

- Mi haltigis ĝin - respondis la lernanto-ŝoforo.

- Kial ĝi skuiĝas tamen?

- Ĉar ĉi tiu instruisto sidanta apud mi, tremadas eĉ nun.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La ŝafisto

Eksterlandaj turistoj ekskursas en la hungara ebenaĵo Hortobágy. Ili atingas iun ŝafiston gardantan la ŝafaron. Iu ekskursanto demandas lin:

- Ĉu ne estas enuige esti ĉi tie kaj fari nenion?

- Ho, ne! - respondas la ŝafisto - ĉar iu ĉiam venas ĉi tien, kiu havas nenian farendaĵon kaj demandas ĉiuspecajn stultaĵojn!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La kaŝdenuncanto

En la gazeto aperas anonco, laŭ kiu la polico serĉas luphundojn. Inter la anonciĝantoj estas ankaŭ sinjoro Kovács, kiu kondukas per ŝnureto hibridan melhundon.

- Kion vi volas fari ĉi tie? - admonis la oĉjon la policisto.

- Mi pensis, - respondis la homo - certe ĝi taŭgus trovi iun kaŝdenuncanton.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Ĉe la kuracisto

- Sinjorino, la nervoj de via edzo tutkaputiĝis. Li bezonas senĝenan trankvilon - diras la kuracisto.

- Mi scias, sinjoro doktoro. Ankaŭ mi diras al li tion, ĉiutage trifoje!

(Fonto de la tradukbazon servanta originale hungarlingva teksto: ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Ĉu la knabo estas aliula infano?

Steĉjo malpurigis sin, li aspektis tute nerekoneble.

- Kiel vi aspektas? Tuj vi ricevos du vangofrapojn! - krias al li la patrino.

- Ne! Povas esti, ke li ne estas nia filo! - intervenis la patro.

(Fonto de la hungara originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Lavistinoj

Du maljunaj fraŭloj paroladas.

- Mia lavistino estas terura sinjorino. Ŝi reportas la ĉemizojn sen butonoj post la lavado.

- La mia estas pli terura, ol la via - parolas la alia. - Tiu reportas la butonojn sen ĉemizoj, post lavado.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La edzo

Iu aĉetanto iras en modobutikon kaj petas ĉemizon numero 41-a kaj piĵamon numero 38-a.

- Ĉu ambaŭ estos por vi mem? - demandas la vendisto mirante.

- Jes, por mi mem.

- Kial vi petas pli malgrandan piĵamon, ol ĉemizon?

- Ĉu vi scias kiel „malgranda” mi estas hejme?

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La maljunega hundo

Iu sinjoro maljuna decidis iri al Nacia Parko en Afriko. Li kunportis sian oldan hundon, por havi societon. La hundo iutage peladis la papiliojn kaj subite rimarkis, ke ĝi vojeraris. Ĝi iradis tien kaj reen por ektrovi la ĝustan vojon. Subite ĝi rimarkis, ke leopardo rapidegas al ĝi por manĝi ĝin.

La olda hundo pensis: „Ho, ve! Mi estas vere en malbono!” Dume ĝi rimarkis en la proksimo kelkajn ostorestaĵojn devenantajn el iu bestkadavro. Ĝi komencis maĉi la ostojn turnante la dorson al la proksimiĝanta leopardo. Kiam la leopardo jam preskaŭ sursaltis ĝin, la olda hundo ekkriis: „Ĉi tiu leopardo vere estis tre bongusta! Ĉu mi trovos ankoraŭ unu?”

Aŭdante tion la leopardo, lastmomente malrapidigis la salton, terurate rigardis la oldan hundon kaj eskapis. „Ho, ve! - flustris la leopardo - ĉi tio estis danĝera situacio. Tiu hundo preskaŭ kaptis min.”

Dume iu olda simio, kiu rigardis la tutan scenon sidante sur iu arbobranĉo, pensis, ke ĝi povas havi utilon el la vidaĵo kaj marĉandi defendon de la leopardo. La simio kuraĝis kuri post la leopardo, sed la olda hundo, vidante la simion kuranta post la leopardo, divenis ĝi ruzon de la simio. La simio atingis la leopardon, malkovris la artifikon de la hundo kaj proponis marĉandon. La juna leopardo furioziĝis, pro la trompo: „Venu ĉi tien, simio, saltu sur mian dorson, kaj vi vidos, kia estos la sorto de iu kiu volas superruzi min!”

La olda hundo vidis alkurantan leopardon kun la simio surdorse kaj maltrankviliĝis: „Nu, kion mi faru nun?” Sed anstataŭ eskapi ĝi denove sidiĝis, la dorson turnante al la atakantoj kaj afektis, kvazaŭ ĝi ne vidintus ilin. Kiam ili atingis je aŭddistanco, ĝi ekkriis: „Kie estas jam tiu idiota simio? Mi sendis ĝin jam antaŭ unu horo por porti plian leopardon!”

Instruaĵo:

- Neniam priridu la maljunulojn!

- La aĝo kaj artifiko ĉiam venkas la forton kaj junecon. La spirito kaj ruzeco pliiĝas de la aĝo kaj sperto.

(Fonto: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La ĝusta konvinko

Blondulino sidiĝas en la flugmaŝino. La stevardino iras al ŝi kaj diras: „Ĉi tio estas la unua klaso. Vi devas sidiĝi ĉe la dua klaso. Via bileto validas tie.” La blondulino respondas: „Mi estas blonda kaj bela, mi veturas al Aŭstralio, mi restas ĉi tie.” La stevardino iras al la pilotejo kaj diras, ke la blondulino ne volas sidi ĉe la dua klaso. La vicpiloto diras: „Nu, mi priparolos kun ŝi.” Li iras al la blondulino kaj diras: „Kara sinjorino, via bileto validas ĉe la dua klaso. Vi devas sidiĝi tie, ĉar ĉi tie estas la unua klaso.” La blondulino respondas: „Mi estas blonda, bela, veturas al Aŭstralio, mi restas ĉi tie.” La vicpiloto iras al la piloto, diras la paroladon kun la blondulino. Tiam diras la piloto: „Nu, mi parolos kun ŝi, ankaŭ mia edzino estas blonda, mi konas la parolmanieron kun blondulinoj.” La piloto iras al la blondulino, flustras en la orelon de la blondulino. La blondulino tuj ekstaras kaj sidiĝas al la dua klaso. La stevardino kaj la vicpiloto nur gapas. La piloto klarigas: „Mi diris, ke la unua klaso ne al Aŭstralio flugas.”

(Fonto de la hungarlingva origino: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Garantiaĵo kredita

Samuelo iras al Banko de Israelo. „Bonan tagon, Samuelo!” - salutas lin estimplene dungito de la banko. „Bonan tagon! Mi petas unu dolaron da kredito” „Ĉu unu dolaron?? Samuelo, ja tion ni povas subtrahi de via konto sen problemoj.” „Ne, mi petas unu dolaran krediton, kion mi repagos dum unu monato. Se mi ne ricevas ĉi tiun krediton, tiam mi ĉesigas ĉiujn miajn kurantajn kontojn ĉe via banko, mi forportas juvelojn kaj ĉesigas la kontaktojn kun vi.” „Samuelo, ĉio estas en ordo, ni donas tiun krediton. Ĉi tie estas la subskribendaj dokumentoj.” „Kiom da interezo estas?” „po 3% monate.” „Estas en ordo, sed mi volas lasi ĉi tie mian aŭtomobilon BMW kiel garantion.” „Ne, Samuelo, tio ne necesas. Viaj kurantaj kontoj estas sufiĉaj kiel garantio.” „Se vi ne akceptas mian aŭtomobilon kiel garantion, tiam mi ĉesigas ĉiujn miajn kurantajn kontojn ĉe via banko kaj forportas mian tutan havaĵon, juvelojn.” „Estas en ordo, Samuelo, vi povas lasi vian aŭtomobilon en la subteretaĝa parkejo de la banko kiel garantion ĝis 30 tagoj.” „Tio estas perfekta!”

Samuelo hejmeniras kaj ĝoje diras al sia edzino: „Sara, Sara! Ni povos somerumi nun jam trankvile! Mi sukcesis akiri unu parkumejon po 0,03 dolaroj monate!”

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Lerteco

Du amikoj promenadas kaj babiladas en la arbaro.

- Ĉu vi vidas tiun grandegan arbon? Imagu, pasintjare mi surgrimpis ĝin en du minutoj.

- Ne diru! Kaj ĉu vidis iu tion?

- Jes, urso.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La anĝeloj kapablas flugi

Iu knabeto demandas sian patrinjon:

- Patrinjo, ĉu la anĝelinoj povas flugi?

- Kial vi demandas?

- Mi aŭdis, ke paĉjo nomis la purigistinon „mia anĝelino”.

- Jes, tiukaze ŝi flugos.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.femina.hu)
(-- Trad: L.P.)

Majstro-ĉasistoj

Helikoptero submetis du ĉasistojn en la mezo de la arbaro por pafi urson.

- Morgaŭ mi revenos - diris la piloto antaŭ la suprenflugo - sed pafu nur unu urson, ĉar malpermesatas liveri plurajn ursojn per ĉi tiu helikoptero.

Sekvatage kiam la helikoptero revenis, du mortintaj ursoj kuŝis sur la arba kampo.

- Mi diris, ke mi ne rajtas liveri du ursojn!

- Eĥ! Ni donis al la pasintjara piloto cent dolarojn kaj li metis ambaŭ ursojn sur la helikopteron.

La piloto prenis la monon, metis sur la helikopteron la du ursojn, suprenflugis. Nature la helikoptero estis troŝarĝita kaj post dek minutoj falis. La du ĉasistoj transvivis la malfeliĉaĵon.

- Kie ni estas laŭ vi? - demandis konsciiĝante unu el la „famaj majstro-ĉasistoj”.

- Mi pensas, ke ni estas ne malproksime de tiu loko, kie ni falis pasintjare.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Nov-geedzoj

La nova edzo demandas sian edzinon:

- Karegulino mia! Per kio vi farĉis ĉi kokinon?

La edzino:

- Per nenio, ja ĝi ne estis malplena!

(Fonto de la origine hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Du pomoj

Du pomoj rigardadas suben al la mondo. Unu ekparolas:

- Ĉu vi vidas la homojn? Ili mortigas, murdas, prirabas unu la alian. Se tio same fluos plu, nur ni pomoj restos solaj sur la tero.

Je tio respondas la alia:

- Ĉu la verdaj aŭ la ruĝaj restos?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Granda ŝanĝo

Mia karulo, neimageble ŝanĝis vin du boteloj da vino.

- Mi ne drinkis tiom.

- Sed mi jes.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Dankmono

En kuracista konsultejo:

- Sinjoro, vi povas danki al via propra forta organismo, ke vi resaniĝis.

- Bone estas, ke vi diris tion nun! Mi ĝuste nun volis pagi dankmonon al vi, sinjoro doktoro.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Envio

En alia kuracista konsultejo:

- Sinjoro doktoro! Mia koro pulsegas, mia talio doloras, mi havas kapturnon, mia koro pikas kaj en mia stomako estas spasmo.

La kuracisto esploras la malsanulon, poste trovante nenian damaĝon konstatas:

- Mi envias vin pro via forta organismo, kiu toleras ĉion ĉi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Mallonga telefonado

- Mi gratulas, kara mia, ĉar ene de dudek minutoj vi finis la telefonadon. Kun kiu vi parolis?

- Mi ne scias. Ĝi estis misa telefonvoko.

(Fonto de la hungarlingva originalo ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La oro-stango

- Infanoj, diru; kio okazos pri orostango, se ni lasos ĝin subĉiele?

- Oni forŝtelos ĝin.

(Fonto de la hungarlingva originalo ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Infandiro en la infangardejo

Tri-jara knabeto demandas:

- Kara onjo vartistino, ĉu vi havas edzon?

La vartistino respondas:

- Jes. Kial?

La knabeto:

- Ĉar mi ne havas.

(Fonto de la hungara originalo: www.bobitaovi-torokbalint.hu)
(-- Trad: L.P.)

Tempo de atendado

- Kelnero! Ĉu mi devas sidi ĉi tie ĝis noktomezo, ke mi ricevu mian konjakon?

- Ho, tute ne, mia sinjoro! Ni fermas la drinkejon vespere je la 9-a!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En la frenezulejo

Malsanulo skribadas entuziasme en la frenezulejo.

- Kion ni skribas? Kion ni skribas? - demandas la vizitanta profesoro afable.

- Mi skribas leteron al mi mem.

- Pri kio ĝi temos?

La malsanulo rigardas la kuraciston mirante pro tio.

- De kie mi povas scii, ja mi ankoraŭ ne ricevis tion.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La ĵaluza edzino

La ĵaluza edzino traesploras ĉiutage la kompletojn de vestaĵoj, palton de sia donjuana edzo. Se ŝi trovas sur tiuj virinan kapharon, tiam kverelado sekvas. Sed iutage ŝi esploras vane. Pro tio ŝi kolere perdas la sinregon:

- Ludoviko! Ĉu jam eĉ la senharajn virinojn vi ne lasas esti trankvilaj?

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Je la geedziĝo

Edziĝas la leono. La muso entuziasme gratulas la leonon:

- Akceptu miajn bondezirojn, kara frato mia!

Ankaŭ alia leono atendanta tie por gratuli, kolerete vortatakas la muson:

- Kion vi pensas kiu vi estas? Kiel vi kuraĝas nomi vin frato, se vi estas muso!!!

La muso jene respondas:

- Antaŭ mia edziĝo ankaŭ mi estis leono!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Post la nuptonokto

Post la nuptonokto la juna edzo ŝteliras en la kuirejon por kuiri la matenan kafon por la karulino. Dume la novedzino vekiĝas, la nigra kafo jam vaporas sur la pleto antaŭ la edzino. Ŝi gustumas la en taso estantan nigran kafon kaj tuj kolereksplodas kontraŭ la edzo:

- Ĉu eĉ kafon vi ne kapablas kuiri?

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Karega mia!

- Karega mia, ĉu vi deziras jaguar-tipan aŭtomobilon donace por via naskiĝtago?

- Ne.

- Ĉu eble unu vizopeltan mantelon vi deziras?

- Mi dankas, sed ne.

- Ĉu vi ĝojus pro diamant-kolringo?

- Ne. Mi ŝatus eksgeedziĝi.

- Ho, tiom grandan elspezon mi ne planis!

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kuracisto ĉe alia kuracisto

La bestkuracisto malsaniĝas kaj iras al la familia kuracisto.

- Kio estas via plendo? - demandis la doktoro.

- Mia sinjoro, mi estas bestkuracisto. Mi kuracas miajn malsanajn bestojn, ke pri nenio mi demandas ilin, ja ili ne scias respondi. Ĉu vi ne kapablas agi same?

- Sed jes - respondis la doktoro iomete pensadante.

La doktoro ekzamenas senvorte la bestkuraciston kaj donas al li recepton.

- Jen, ĉi tiun medikamenton aĉetu en la apoteko!

- Ĉu tiu efikos?

- Jes. Sed se ĝi ne estus bona, tiam mi dormigos vin ...

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Hejma laboro

Plendas la edzino al la edzo:

- Atentu Eŭgeno, vi ĉiam hejmenportadas vian laboraĵon de la laborejo. Pro tio mi ne povas jam vivi plu kun vi!

- Nu, kaj! Multe da homoj agas same. Bedaŭrinde, ni devas vivi ĉi tiel ...

- Vi pravas, sed ne ĉiu estas SEKCIO-MAJSTRO.

(Fonto de la hungarlingva originalo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La absoluta teruro

- Ĉu vi scias kio estas absolute terura?

- Kio?

- Se vi volas kvereli, sed tute ne estas kun kiu!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Vosto de sciuro

Infanoj inter si:

- Kial estas malantaŭe la vosto de la sciuro?

- Ĉar antaŭe estas la sciuro.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Dekoltaĵo

Kio estas dekoltaĵo?

Tio estas larĝa dekoltaĵo de la vestaĵo ĉirkaŭ la kolo, helpe de kiu la juna virino akiras edzon por si mem kaj la maljuna virino povas akiri gripon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Vivnivelo

Du pensiuloj renkontiĝas printempe.

- Saluton, mia amiko! - diras unu - ĉu ankaŭ vi atendas la someron? Povas esti, ke somere nia vivnivelo pliboniĝos!

- Kial?!

- Ĉar vintre ni kaj malvarmumis kaj ankaŭ malsatis, sed somere ni nur malsatos!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Ĉe bestkuracisto

La bestkuracisto petas asistantinon doni laksigilon al la ĉevalo. Li klarigas la farendaĵojn:

- Enŝovu tubon en la buŝon de la ĉevalo, metu la pilolon en la tubon kaj bone forte blovu en la tubon. Pere de tiu enblovo la medikamento atingos la ezofagon de la ĉevalo.

Post duonhoro li demandas la asistantinon:

- Ĉu nun jam efikas la laksigilo?

- Jes. Sed bedaŭrinde la ĉevalo blovis kiel unua.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La klarmensa masonisto

Klarmensa konstruisto labori volas, al gazeto sendas anoncon:

- Klarmensa masonisto serĉas laboron. Se la konstruaĵo restas staranta, el ĝi estos muro. Se ĝi terenkliniĝos estos el ĝi trotuaro, al io ĝi certe bonos.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La pomerhundo

Pomerhundo sidas sur la sino de sia posedantino. La posedantino karesadas, karesnomas ĝin Kontraŭ ĝi sidas viro, kiu efike de la spertita kara vidaĵo alparolas la virinon:

- Mi volonte estus en situacio de la hundeto!

- Mi ne kredus!

- Kial?

- Nome mi nun portas ĝin al veterinaro por tranĉigi ĝian voston...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Elekto de profesio

- Kio vi ŝatus esti, fraŭleto? - oni demandas junulon dum konsulto pri elekto de estonta profesio.

- Vintre: urso, somere: pedagogo mi ŝatus esti - venis la respondo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Soldata ŝarĝaŭto

Iu soldata ŝarĝaŭto ne kapablas pluiri pro la koto. Post minuto aperas oficira ĵipo, en ĝi kvar oficiroj. La oficiroj elŝovas la aŭton el la koto, poste oficiro demandas la ŝoforon:

- Kion vi transportas?

- Mi anoncas humile al sinjoro kolonelo, ke mi transportas tridek ses rekrutojn.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kion fari?

Dum kuracista konsultado la profesoro al la medicinstudentino:

- Unu piedo de malsanulo estas pli mallonga, pro kio li lamas je sia piedo. Kion vi farus ĉi-kaze?

- Ankaŭ mi lamus.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: ricsidoktor.hu/orvosi-humor.html)
(-- Trad: L.P.)

Unu mankavo da piloloj

Iu iras al la kuracisto. La kuracisto ekzamenas la homon, poste diras:

- Ĉi tie estas unu mankavo da piloloj. Matene glutu la bluan kaj trinku unu glason da akvo; tagmeze glutu la flavan kaj trinku glason da akvo; vespere antaŭ la enlitiĝo glutu la ruĝan kaj trinku unu glason da akvo!

- Kial mi estas malsana? - demandas la malsanulo.

- Ĉar vi ne trinkas sufiĉe da akvo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Mono

Iu pensiulo vekiĝas, ĉar li aŭdas ŝteliston iri-veni en la loĝejo li ekkrias:

- Helpon!

- Ne faru bruon! - silentigas lin la ŝtelisto. - Ni bezonas nur monon.

- Ho, tio estas alia afero - diras la pensiulo. - Tiuokaze ni serĉu kune, ĉar ankaŭ mi bezonus monon ...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Sur aŭtobuso

- Mi petas la biletojn, lubiletojn! - diras la kontrolisto.

- Mi estas jam pli ol sepdek - jara - diras la pasaĝero.

- Ĉu vi povas atesti tion?

- Memkompreneble. Se mi estus pli juna, tiam mi flankenpuŝus vin kaj forkurus.

(Fonto: de la tradukbazon donanta hungarlingva ŝerco - ne konatas.)
(-- Trad: A.P.)

Sur la strato Váci

Sankta Petro promenas sur la strato Váci. La homoj kolektiĝas ĉirkaŭ lin kaj miras. Petro paŝas al blindulo, metas la manon sur la okulojn de la blindulo kaj tiu komencas vidi. Poste Petro paŝas al surdulo, metas la manon sur la orelojn de la surdulo kaj tiu komencas aŭdi.

Poste Petro paŝas al alia homo... Tiu komencas teruriĝante retiriĝi:

- Ne tuŝu min, mi estas handikapita pensiulo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

En forĝejo

Iu turisto hazarde iras en forĝejon. Nova varma huffero ĝuste tiam pretiĝas. La turisto vidante tiun, demandis:

- Ĉu mi povas rigardi ĉi tiun hufferon?

- Memkompreneble.

La turisto prenas tiun, sed en la sama momento forĵetas, ĉar ĝi estas varmega.

Efike de tio la forĝisto demandas la turiston:

- Kio estas la problemo? Ĉu ĝi estis varma?

- Ho, nenio, mi scias rigardi hufferon ege rapide!

(Fonto de la originala jungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

En gastodomo

- Mia kara sinjoro, ni certigas al vi hejmajn cirkonstancojn - akceptis la gaston la posedanto de gastejo.

- Mi diras sincere, ke mi ne tion ĉi volis. Mi ŝatus pasigi ĉi tiun semajnon trankvile kaj silente!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La ĵaluza edzino

La ĵaluza edzino trovas telefonnumeron en la poŝo de la mantelo de ŝia edzo. Ŝi diskas la numeron kaj ŝrikas:

- Mi scias ĉion!

- Se vi scias jam ĉion, kial vi telefonis al la informejo? - aŭdiĝas la respondo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Erinaco

La erinaco trovas truitan pneŭmatikon rande de la landvojo. Ĝi turniĝas al sia amiko kaj diras.

- Fine! Almenaŭ unufoje ni venkis!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Kial nervozas la infanĝardena pedagogino?

En infanĝardeno la pedagogino vidante, ke iu infano suferas pro la enbotiĝo, aliris lin kaj helpis en tiu ago. Sed kun la farendaĵo estis jam preskaŭ tute plenumita, la infaneto rimarkigas:

- Pedagogino kara, la boto estas inverse sur mia piedo.

La pedagogino vidas, ke la infaneto pravas, tuj detiris la boton kaj denove suprentiris ĝin same pene, nun jam bone. Sed antaŭ la finiĝo de la ago, la knabeto denove ekvoĉas:

- La boto ne estas mia!

Nu, la pedagogino pene kaptadis aeron, kiam ŝi aŭdis la novan veron, sed kion fari? Ŝi denove tiris la boton, serĉis la veran, kaj nun jam ŝvitante ŝi klopodis surigi ilin sur la piedojn de la bubo. Finante la same malfacilegan agon, ŝi sentis plifaciliĝon kaj demandis la knabeton:

- Petreto! Kie estas via ĉapelo?

En mia boto - venis la respondo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: A.P.)

Virkato

- Kio okazis pri via kato, mia karulino? - demandas iu najbarino sian najbarinon. - Nome dum la tuta hodiaŭa posttagmezo ĝi kuregadas de unu domtegmento al alia. Ĉu povas esti, ke ĝi freneziĝis?

- Ho, ne! Mi kastrigis ĝin hodiaŭ antaŭtagmeze kaj nun ĝi rezignas pri la rendevuoj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Ekskurs-vojo

Du katetoj paroladas iuvespere sur la ferdeko de ŝipo:

- Ĉu tio estas certa, ke ĉi tiu ŝipo navigos al la Kanariaj insuloj?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Helpovoko

En la ĉambro de la polico la telefonaparato sonoras.

- Help'! - iu ekscitita voĉo aŭdiĝas en la telefonaŭdilo. - Venu tuj, ĉar iu kato rompŝtelis en la loĝejon!

- Ĉu?! Kiel vi imagas, ke pro tiu bagatelaĵo vi vokas la policon?! Kiu vi estas?

- Mi estas la papago.

(Fonto: de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Kristnaska donaco

Iu infano de malriĉa familio demandas sian patron:

- Paĉjo, ĉu je kristnasko estos io sub la kristnaska arbo?

- Jes, la planko, kara mia fileto.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Al gejunuloj, por scii kiuj situacioj atendos ilin maljuniĝintajn. Al gemaljunuloj por priridi.

1, ***Iu multjara sinjoro luktis jam multajn jarojn pri aŭdproblemoj***. Li vizitis sian kuraciston kiu sukcesis akiri tiun fonoforon, kiu certigis por la maljuna paciento 100 %-an aŭdkapablon.

Je la kontrolesploro la kuracisto kontente pri si diris al la maljunulo:

- Via aŭdkapablo perfektas. Mi pensas, ankaŭ viaj apartenuloj same tre ĝojas pro tio ĉi.

La maljunulo respondis:

- Ĝis nun mi ne parolis pri ĝi al mia familio. Mi nur sidadas kaj aŭskultas ilian paroladon. De unu monato mi reskribis mian testamenton jam trifoje.

2, ***En hejmo de gemaljunuloj*** sub arbo babiladas du maljunaj homoj. Unu al la alia:

- Mi estas 86-jara kaj mi havas dolorojn en ĉiuj korpopartoj. Mi scias, ke ankaŭ vi estas similaĝa. Kiel fartas Vi?

La alia respondas:

- Kara mia amiko Adalberto! Mi fartas kiel novnaskito!

- Ĉu vere?

- Jes! Mi havas nek dentojn, nek hararon, kaj mi ĵus sentis, ke mi enurinas.

3, ***Du maljunaj geedzoj vespermanĝis*** kune en la hejmo de amika paro. Post la vespermanĝo la du edzinoj eliris en la kuirejon. La du edzoj restis en la ĉambro.

- Hieraŭ ni vespermanĝis en restoracio tre perfekta. Mi rekomendas ĝin elprovi - diras la unua edzo.

- Kiel nomiĝas tiu restoracio? - demandis la alia.

La unua edzo pensadis longe, fine li demandas:

- Kiel nomiĝas tiu rozkolora kaj pikanta floro kiun vi kutimas doni al viaj geamatoj?

- Ĉu vi pensas pri rozo? - demandas la dua edzo.

Je tio la unua edzo elkrias al la kuirejo:

- Rozo, kara mia karulino, kiel nomiĝas la restoracio kie ni vespermanĝis hieraŭ?

4, ***Pensiulo diras al sia 80-jaraĝa amiko****:*

- Ĉu vere vi edziĝos?

- Jes.

- Ĉu mi konas la damon?

- Ne.

- Ĉu la damo estas plaĉa?

- Ne tre.

- Ĉu ŝi bone kuiras?

- Apenaŭ.

- Ĉu ŝi bonas en la lito?

- Mi ne scias.

- Kial vi volas edzinigi ŝin?

- Ĉar el inter ni nur ŝi havas eĉ nun validan kondukrajtigilon.

5, ***Iu rakontas al sia najbaro:***

- Ĝuste nun mi aĉetis novan fonoforon. Pere de ĝi mia aŭdo fariĝis perfekta.

- Kiom ĝi kostis?

- 4000 dolarojn.

- Kie estas ĝi fabrikita?

- Tridek post la dektria.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

6, ***En hejmo de gemaljunuloj*** tri grandaĝaj viroj paroladas pri zorgoj de la emeritoj:

- La 60-jara aĝo estas la plej malbona - diras unu el ili. - La homo sentas tuttage, ke li devas pisi, sed vane staras en la necesejo, fajfas, lasas flui akvon, tamen venas nenio.

- Tio estas nenio - diras la 70-jara viro. - Se oni pasis jam 70, la homo ne havas plu normalan fekadon. Li vane nutras sin per fibrohava nutraĵo, trinkas multe da akvo, vane sidas en la necesejo, venas nenio.

- Vere la 80-a jaraĝo estas la plej malbona - diras la tria viro.

- Ĉu vi same havas urinajn problemojn? - demandas la 60-a jarulo.

- Vere ne. Mi urinas ĉiumatene je la 6-a horo. Mi pisas kiel kurĉevalo, mi ne havas zorgon pri tio.

- Nu, Ĉu vi havas fekaĵadan problemon?

- Ho, tute ne. Ĉiumatene mi fekadas je 30 post la 6-a.

Kolere kaj grumblante alkrias lin la 70-a jarulo:

- Mi ne komprenas. Se vi povas bone pisi kaj feki, kiun zorgon vi havas 80-a jaraĝe?

- Nu, tion, ke antaŭ la 10-a horo mi neniam vekiĝas.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

7, *Iu maljuna geedzo-paro havas problemojn* por la forgesemo. La kuracisto konsilas al ili, ĉar ili ne tre havas fizikajn malsanojn, do por pli bone rememori aferojn estus rekomemdenda ago, ke ili faru notojn pri la memorindaj aferoj.

Dum ili rigardas la televidan programon - la maljuna edzo ekstaras el la fotelo kaj demandas la edzinon:

- Ĉu vi petas ion el la kuirejo?

- Jes. Ĉu vi portus al mi glason da glaciaĵo?

- Jes.

- Ĉu vi ne forgesos ĝin?

- Ne!

- Ĉu vi ne volus surskribi tion?

- Ne, mi povas teni mense.

- Mi petas ankaŭ kelkajn frambojn sur ĝi, sed ĉu vi vere ne forgesos?

- Ne, vi petis glason da glaciaĵo kun framboj.

- Mi petas ankaŭ dolĉan laktokremon sur la tuto sed ĉu vi vere ne forgesos?

- Ne, vi petas glason da glaciaĵo kun framboj kaj sur la tuton dolĉan laktokremon!

- La edzo eliras de la ĉambro kaj post duonhoro revenas el la kuirejo, enmane kun du teleroj sur plado. Sur ili prezentis sin bakitaj ŝinkoj kaj du ovoj.

La edzino vidante la telerojn, alkrias la edzon:

- Ho Karlo, mi sciis, ke vi forgesos pri mia peto! Kie estas mia toasto?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

En ĉapelvendejo

Iu eniras vendejon kaj diras:

- Mi ŝatus aĉeti ĉapelon por mia bopatrino. Ĉu vi havas?

- Jes ni havas, sed kian kapon havas via bopatrino?

- Malbelan.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La militŝipo

Naĝas militŝipo sur la oceano. Foje en la foro la kapitano ekvidas lumon. Li tuj paŝas al la radio kaj post la kontaktiĝo kun ĝi li ordondonas:

- Ĉi tie estas la USS MISSURI! Ni proksimiĝas al vi! Flankeniru 5 procentojn!

- Ne! Vi iru flanken 15 procentojn!

- Se vi volas bonon, tuj flankeniĝu, mi estas kapitano de la USS MISSURI!

- Mi estas la gardisto de la lumturo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Surangula oĉjo

Maŭrieto alparolas la panjon:

- Panjo, mi petas cent kvindek forintojn.

- Kial?

- Surangule staras iu oĉjo...

- Bone mia filo, certe la kompatindulo vivas el almozpetado.

- Ne, li vendas glaciaĵojn.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Kakto kaj kateto

- Bonan vivon havas katetoj! - ĝemas unu kakto al alia.

- Kial?

- Ĉar la kateton oni ofte karesas, sed nin tute ne.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La leporeto kaj la vendisto

Leporeto iras en la legomvendejon, surbatas la vendotablon kaj demandas:

- Ĉu estas karoto?

- Ne estas.

Sekvatage la leporeto denove iras en la legomvendejon kaj denove demandas:

- Ĉu estas karoto?

- Mi diris, ke ne estas tio, sed se ci surbatos la vendotablon, tiam mi gluos vian brustan kruron al la vendo-standon.

Triatage la leporeto denove aperas en la vendo kaj jam ĉe la pordo krias:

- Ĉu estas gluaĵo?

- Tio ne estas, leporeto.

- Se ne estas gluaĵo, mi petas karoton.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Ĝis nun nekonata fenomeno

Diplomato alvenis en la ĉefurbon de la prosperanta lando. Li portigis sin al tabakbutiko kie li petis skatolon da cigaredoj por aĉeti. Tie okazis la sekvonta parolado:

- Ĉe ni ne troveblas la dezirata varo. Vi povas aĉeti cigaredojn en la preĝodomo.

- Ĉu? Ja oni devas preĝi tie.

- Ne, mia sinjoro, oni kutimis preĝi en la universitato.

- Kial? Ĉu tie oni ne studas?

- Ĉe ni oni lernas en la prizonoj.

- Sed ĉi-kaze kien oni portas la krimulojn?

- Nenien, ja ili havas la potencon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La superruzita museto

La patrino de museto ekiris por labori, sed unue admonis sian idon ne elveni de ilia loĝtrueto, se iu kato miaŭas. Post la foriro de la panjo, ne longe la museto aŭdas la sekvan:

- Kukuriku! Museto, venu por ludi!

La museto elkuris de la trueto. La kato kaptis ĝin kaj manĝis. Poste la kato lekadis sian buŝon kaj kontente katmurmuris:

- Fakte estas bona afero, se iu parolas fremdan lingvon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

En fervoja stacio vintre

En la Fervojstacio Okcidenta en Budapeŝto, en 1987, la laŭtparolilo aŭdigis la sekvan atentigon:

- Ni atentigas la atendantojn, ke la trajno IC, venonta el la direkto de la urbo Nyíregyháza, malfruos kvar horojn.

Je tio ekvoĉis krio:

- Ĉu ĝi tial malfruiĝas, ĉar la vojaĝantoj malrapide puŝas ĝin?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: A.P.)

Zorgoplena fraŭlo

Iu skota fraŭlo promenas kun sia amikino sur la bordo de la rivero. Subite la fraŭlino alparolas:

- Mi donus al vi kvin anglajn pundo-sterlingojn, se mi scius la kaŭzon de via malĝojo.

- Ĉar mi dezirus kisi vin, sed mi ne havas kuraĝon.

Ŝi aŭdante la sincerecon de la fraŭlo, kisas la fraŭlon. Ŝi post kelkaj minutoj denove alparolas:

- Vi estas denove malĝoja. Kial?

- Ĉar mi ne ricevis tiujn kvin pundojn.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Dialogo en la parko

Iu sidas en la parko surbenke kaj legas. Apud li iradas iu hundo. Piediranto demandis lin:

- Ĉu via hundo mordas?

- Ne - aŭdiĝis la mallonga respondo.

Sciante tion ĉi, la piediranto iris al la hundo por karesi tiun, sed la hundo mordis lin. La damaĝito indignante riproĉis la sidanton:

- Vi diris, ke via hundo ne mordas!

La viro ĉesigas la legadon kaj diras:

- Jes, mi diris tion, sed tiu ĉi hundo ne estas la mia!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kundormanto

La eta Nikolao estas ege vigla infano. Lia fratino vane kuŝigas lin en la liton por dormi, li plie paroladas kun sia pli aĝa frato. Fine lia panjo kuŝigas lin en sian liton por dormi kun ŝi. Sed al la infano ne plaĉas tio, ĉar tie li vere devas dormi. Sekvatage dum la matenmanĝo li iras al sia patro kaj diras:

- Mi kompatas, vin paĉjo, ĉar vi devas dormi ĉiam apud mia panjo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Konatiĝo

Skota viro sidadas en restoracio.

- Ĉu vi atendas iun? - demandas la kelnero.

- Jes. Mi sendis geedziĝan anoncon kaj ĉi tie estos la rendevuo kun iu virino.

- Ĉu ŝi ankoraŭ ne alvenis? - demandis la kelnero.

- Sed jes. Ŝi tie sidas en la angulo.

- Kial vi ne iras al ŝi?

- Ĉar ŝi devas manĝi kremfarĉitan benjeton kiel rekonilon.

- Sed mia sinjoro, ŝi jam manĝas la kvinan.

- Mi atendas ĝis ŝi satiĝas. Mi ne volas pagi por ŝi vespermanĝon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La tranĉilo kaj la bopatrino

- Kio estas la diferenco inter la tranĉilo kaj la lango de la bopatrino?

- Mi ne scias.

- La tranĉilo povas foruziĝi, sed la lango de la bopatrino neniam.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La futbaljuĝisto

La futbaljuĝisto fajfas, ĉar iu futbalisto faris diskuteblan malregulaĵon. Efike de tio alia futbalisto krias furioze al la futbaljuĝisto:

- Ĉu vi, sinjoro futbaljuĝisto, estas tute blinda?

- Kion vi diris? - demandis la futbaljuĝisto kolerege.

Efike de tio la futbalisto diris:

- Mia dio, pluse li estas ankaŭ surda!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Amikoj inter si

Du amikoj paroladas:

- Kial vi estas malĝoja?

- Mia bopatrino volas forveturi kaj foresti unu plenan monaton.

- Sed vi devus ĝoji pro tio!

- Jes, sed se ŝi vidus, ke mi ĝojas, tiam ŝi certe restus ĉi-hejme!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Plumojn havi aŭ ne

- Jean!

- Jes, mia sinjoro!

- Ĉu la citrono havas plumojn?

- Tiu ne havas.

- Ho, povas esti, ke mi premtordis la papagon en mian teon!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

En aviadilo

En la aviadilo malfunkcias iu transmisiilo. La piloto petas la pasaĝerojn fiksi sin per la sekurigaj rimenoj, pro la okazo de trudita alteriĝo. Li petas la stevardinon kontroli la plenumon de la tasko.

- Ĉu ĉiuj fiksis sin per la sekuriga rimeno?

- Jes, sed iu advokato ĝuste nun donadas al ĉiu sian nomkarton.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

En kafejo

Du viroj sidas en kafejo. La kelnero iras al ilia tablo kaj demandas:

- Kion mi povas porti al vi?

- Mi petas teon - diras unu el ili.

- Mi la samon petas, sed la taso estu pura - diras la alia.

Post ne longa tempo la kelnero portas la du tasojn da teo.

- Bonvolu, ĉi tie estas la du tasoj da teo. Kiu petis la teon en pura taso?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Patro kaj infano

- Paĉjo, kial vi geedziĝis ĝuste kun la panjo?

- Ĉu vi aŭdis, mia karulino? Jam ankaŭ la infano ĉi tion demandis!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Sur la bordo de lago

Geedzoj Kovács somerumas sur la bordo de Balatono. Dum la unua vespero kuloj pikadis ilin.

- Se vi malŝaltus la lampon, tiam la kuloj ne venus en la ĉambron - diras sinjorino Kovács.

Sinjoro Kovács obeas kaj malŝaltas la lampon.

- Sed en la malhelan ĉambron neatendite enflugas du lampiroj.

- Ĉu vi vidas? Eĉ tio ne utilas - diras la edzo - el tiuj malbenitaj sangosuĉantoj nun du venas kun poŝlampoj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kuracista filozofio

- Kio estas la vivo?

- Morta malsano, kiu disvastiĝas nur pere de sekskuniĝo.

(Fonto de la origine hungarlingva teksto: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Medicina praktiko

- Kio estas la malbono, kara mia? - demandas la edzino.

- Tiu fuŝanto mia kolego malbonigis mian privatan medicinan praktikon dum miaj ferioj! Li resanigis miajn malnovajn malsanulojn!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccsviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Galo-malsano

- Sinjoro doktoro! Mi ege timas! Oni kuracis ankaŭ mian onklon pro galo-malsano kaj li mortis pro stomaka ulcero.

- Estu trankvila! Ĉi tio ne povas okazi pri vi. Se oni kuracas iun pro galo-malsano, tiam tiu tutcerte mortos pro galo-malsano!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Post nasko

La panjeto rekonsciiĝas, oni donas al ŝi ŝian bebon kaj la franjo anoncas:

- La feliĉa patro estas sur la koridoro. Ĉu mi povas lasi lin enveni?

- Ho, ve, ne! Mia edzo tuj alvenos!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Akuŝejo

- Ĉefo! Mi petas pardonon pro la malfruo! Mi devis porti mian edzinon en la akuŝejon.

- Mi ne estas idioto! Vi diras ĉi tion ĉiumonate.

- Ĉu via edzino estas leporo?

- Ne, ŝi estas akuŝistino.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Konata bela sinjorino

Sangakorpa tradraŝino vizitas kuraciston.

- Kio okazis? - demandis la kuracisto.

- Mia edzo tradraŝis min.

- Sed ja mi sciis, ke li foriris.

- Ankaŭ mi kredis la samon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Hipokondriulo

- Sinjoro doktoro! Mi estas sinjorino Nagy! Mia edzo malbone fartas! Li petis min venigi vin al li - diras la edzino en la telefonon.

- Mi tute ne volas eliri noktomeze! Via edzo ne estas malsana, nur trompanto. Li nur imagas ke li estas malsana. Voku min matene. Matene li imagos ion alian.

Sekvatage la edzino vokas la doktoron:

- Vi pravis, sinjoro doktoro! Ŝajne, li imagas nun, ke li mortis.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En rezervejo

En la rezervejo iu Indiano kuŝas sur la landvojo kaj premas orelon sur la vojon. Turistoj kolektiĝas ĉirkaŭ tiun. La Indiano diras:

- Ŝevroleto, sur tiu estis registara numero de Florida, aersako je kazo de alpuŝiĝo kaj sidis en tiu kvar palvizaĝuloj...

- Ĉu ĉion ĉi vi konstatis per via orelo? - la turistoj demandis mirante.

- Ho ne. Ĝi antaŭ du minutoj forveturis.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Fiasko sur la montego Everest

Du alpistoj malfacile finfine atingas la montopinton.

- Finfine ni atingis la pinton kaj povas meti tien la nacian flagon. Donu al mi tiun!

- Kion vi diras? Mi kredis, ke ĝi estas ĉe vi!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Du kamparanoj

Du kamparanoj parolas.

- Laŭ mi la nova najbaro tute ne konas la agrokulturan produkton.

- Kial?

Ĉar tiu semis en la ĝardeno lardorostaĵon kaj nun atendas, ke el tio estiĝu porkido.

(Fonto:de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Malfeliĉo

- Ĉu malfeliĉeco estas la renkontiĝo kun nigra kato?

- Jes, por la muso.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

La lavujo

- Jean! Elverŝu la lavakvon el la lavujo!

Dum Jean elverŝis la akvon tra la fenestro, aŭdiĝis krio.

- Kio okazis, Jean? Ĉu iu estis en la lavujo?

(Fonto de la originale hungarlingva teksto: www.viccevicek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kanibalo

Viro suferas pro kanibalismo. Lia edzino sendas lin al la psikiatro. Ŝi demandas lin hejme:

- Kia estis la doktoro?

- Fajna.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Geedzoj

Edzino al sia edzo:

- Kie vi estis nokte?

- Saĝa edzino ne demandas ĉi tion.

- Saĝa edzo diras ĉion al la edzino.

- Saĝa viro ne havas edzinon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Rezulto de taŭrlukto

En Sevillo en la tempo de taŭrluktoj en la tre multekosta restoracio Torero ĉiu vespere oni servas la orkidojn de la venkita bovo, spicumitaj per petroselo kaj timiano. Riĉa usona turisto en la restoracio mendas orkidojn. La ĉefkelnero portas la menditaĵon sur arĝentplado kaj metas antaŭ la gaston. Li deprenas la kovrilon kaj montras al la gasto. Du juglandograndaj globoj estas ene.

- Kio estas ĉi tio? - demandas la gasto.

- Bedaŭrinde sinjoro, nun la bovo venkis - venis la respondo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.1000vicc.hu)
(-- Trad: A.P.)

Teknika ĝeno

- Kio estas teknika ĝeno?

- Se oni devas iri per lifto, ĉar la ŝtuparo ne funkcias.

(Fonto dela originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En hejmo de spirite malsanuloj

Iu malsanulo surbatas sian etfingron per martelo. Poste li ne lasas la marteladon. Post kelkaj batoj tiu ĝojkriegas laŭte. La flegistino rigardas scivole kaj demandas lin:

- Diru al mi, kial tio estas bona?

- Tiam ĝi bonas, se mi maltrafas.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kaktofalsaĵo

- Kio estas la absoluta kakto-falsaĵo?

- En la florpoton plantita erinaco.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: la presita
Rejtvényújság Kacagó/Ridetanto noma gazeto de ENIGMOJ)
(-- Trad: L.P.)

Granda kulpo

Du erinacoj babiladas:

- Se mi hejmeniros, mi elĵetos mian edzinon el la domo.

- Kial?

- Ĉar mi jam tediĝas de ŝia konstanta pikado.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En klasĉambro

La instruistino portas minijupon kaj iras en la lernoĉambron por skribigi skriban laboraĵon. Iuokaze iu infano flustras al unu samklasano:

- Mi vidas femuron de la instruistino!

Ŝi ekaŭdis tion.

- Impertinenta bubo! Iru hejmen kaj mi ne vidu vin tri tagojn!

Pli malfrue alia infano flustras al iu samklasano:

- Mi vidas la postaĵon de la instruistino!

Ŝi ankaŭ tion ekaŭdis:

- Hontu! Iru hejmen. Mi ne vidu vin unu semajnon.

Poste Maŭriceto ekstaras kaj ekiras al la pordo.

- Kien vi iras, Maŭriceto?

- Mi vidis tion, pro kio mi ne venos en la lernejon ĉi-jare!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Perflora akcepto

- Jean! - Mia bopatrino venos al mi kaj mi volas, ke vi akceptu ŝin per florpluvo verŝita de la fenestro.

- Jean, ĉu ankoraŭ ne alvenis mia bopatrino?

- Sed jes, mi akceptsalutis ŝin per la ricevitaj enterpotaj floroj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Antaŭ la fervojstacio

Skoto aliras taksiŝoforon en taksio atendantan antaŭ la fervojstacio.

- Por kiom da monoj vi liverus min ĉe urban adreson?

- Por unu pundo.

- Ĉu ankaŭ la pakaĵojn?

- Tiujn senpage.

- Tiuokaze portu vi nur la pakaĵojn, mi piediros.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La Statuo de Libereco

En la lernejo la instruistino montras bildon pri la Statuo de Libereco.

La instruistino demandas la lernantojn:

- Nu infanoj, kiu scias kion signifas la torĉo en la mano de la Statuo?

Anoncas sin unu infano:

- La torĉo signifas, ke sen lumo en mallumo neniu povas legi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Mistrafo

Du transloĝigaj viroj pene portas grandegan pianon al la deka etaĝo. La lifto ne funkcias. Kiam ili jam atingas la naŭan etaĝon, unu portisto alparolas la alian:

- Hej, Joĉjo, mi havas sciigojn: unu bonan kaj unu malbonan. Kiun mi diru unue?

- Nu, diru la bonan!

- Ni estas jam sur la naŭa etaĝo.

- Kio estas la malbona?

- Tio, ke ni devintus pene porti la pianon en la alian domon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Amikinoj inter si

Du amikinoj renkontiĝas.

- Al kiu vi portas tiun torton?

- Mi portas tiun al sekretariino de mia edzo.

- Ĉu ŝi havas naskiĝtagon?

- Ne. Sed ŝi estas tro svelta.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Ĉapelo

Post la lernejaj instruhoroj hejmenalvenintan infanon akceptas la panjo riproĉante:

- Filo mia kial malpuras via ĉapelo?

- Miaj amikoj piedpilkludis per ĝi.

- Kion faris ili?
- Piedpilkludis.
- Kial vi ne forprenis ĝin de ili?
- Mi ne povis movi min por tio!
- Kial?
- Mi estis la golulo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Kiu pri kio laboras?

La etinfanon promenigas la avo. Ili renkontas kunulon, kiu demandas la infaninon:

- Ĉu vi povas diri vian nomon?
- Mi estas Monika.
- Ĉu vi povas diri kun kiu vi promenas?
- Mi promenas kun mia avo.
- Ĉu vi povas diri kiun laboras via patro?
- Li ne laboras, li estas inĝeniero!

(La originala hungarlingva ŝerco devenas de la ĝin verkinta tradukistino: A.P.)

En taksio

Iu pasaĝero sidiĝas en taksion. Poste demandas la ŝoforon:

- Diru al mi, ĉu estas permesate fumi en via aŭto?
- Ne! Eĉ mi ne fumas.
- Kial estas en la cindrujo multe da cigaredostumpoj?
- Nome tiuj homoj fumis ĉi tie, kiuj ne demandis: „Ĉu estas permesate fumi ĉi tie en la aŭto?”

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En aŭtobuso

- Bonvolu montri la biletojn, aŭ la monatajn abonbiletojn!
- Mi havas nenion.
- Tiuokaze mi devigas vin pagi monpunon kaj mi devigas vin elaŭtobusiĝi.
- Ho, ve! Kiu stiros tiuokaze la aŭtobuson?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Sur ŝipo

Johaneto konsterniĝante vidas, ke lia samkajutano surmetas virinan noktoĉemizon.

- Kio okazis pri vi? Kial vi surmetis virinan noktoĉemizon?

- Mi fartas bone. Sed se la ŝipo subakviĝos, oni savos unue la virinojn kaj la infanojn.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: L.P.)

Interesaĵoj okazas

La edzino de policisto estas enlite kun fremda viro, kiam neatendite la ŝlosilo ektintas en la seruro.

- Sankta mia Di', hejmenvenis mia edzo! Karulo mia, tuj vin vestu, kaj kaŝu vin malantaŭ la televidaparaton!

Dum la amato plenumas la obeindan proponon, la edzineto kuras antaŭ la alvenintan edzon kaj invitas lin en la kuirejon, por ke dume la amato povu eble kaŝiri.

- Bonan tagon, karega mia! Se via labortempo finiĝis jam tiel frue, venu en la kuirejon, pretas jam la vespermanĝo!

Malgraŭ la karvoĉa invito, la edzo enigas sin en la ĉambron, enŝaltas la televidilon, kaj eksidas tuj antaŭ ĝin.

La edzino elkrias de la kuirejo:

- Venu, atendas vin via ŝatata manĝaĵo!

- Mi ne iras manĝi - respondas la edzo - mi rigardas matĉon.

Por helpi la amaton, en la kuirejo ŝi surterenĵetas botelon da biero, sed tiu resaltas en ŝian manon. La edzino esperas, ke la edzo tamen elvenos kaj la amato kapablos foriri. Sed la edzo restas. Kiam la edzino eniras la ĉambron, la policista edzo mire turnas sin al sia edzino:

- Imagu, kiam vi vokis min, ĵus tiam prijuĝis la futbaljuĝisto elstarigon de futbalisto de iu trupo, kaj la elstarigito ĵus foriris apud mi!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Malrezisto de propra plano

Iu policisto decidas, ke li fiŝkaptos el truo en la glacio. Li, trovinte la deziratan glacion**,** komencas rompi ĝin per pioĉo. De li ne malproksime neatendite ekvoĉas atentigo:

- Ne estas fiŝo subglacie!

Sed, nekredante, la policisto pioĉadas plue. Post nelonga tempo, la voĉo denove eksonas:

- Mi ripetas, ke ne estas fiŝo tie sub la glacio!

Malgraŭ tio la policisto daŭrigas la laboron, sed baldaŭ denove atingas lin la atentig**o:**

- Amiĉjo, kredu, ke sub la neĝo ne estas fiŝo!

Nun la policisto ĉesante la laboron demandas:

- Kiu vi estas, prenante kuraĝon diri al mi la policisto, ke fiŝo ne estas sub la glacio?

- Mi estas la laŭtparolanto de la artefarita sketejo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Esenco de denunco

Viro denuncas sian najbaron en la policejo:

- Sur la korto de mia najbaro kuŝas dek kubometroj da lignaĵo.

- Tio ne estas punenda!

- Sed, mia najbaro portis ĝin el Aŭstrio!

- Eĉ tio ne punendas, ja iu ajn povas aĉeti lignon de iu ajn loko.

- Sed en tio, ili kontrabandas oron en la landon!

- Kion?

- Oron!

Je tio, la policistĉefo jam levas la telefonparolilon kaj komencas organizi tujan surprizatakon. Vidante la agon, la denuncinto prenas sian poŝtelefonon kaj alvokas sian denuncitan najbaron:

- Atentu**,** Ali! Mi ĝuste nun sendis al vi hakistojn! Povas esti, ke estos la sama bando, kiu fosis pasintjare vian ĝardenon!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Bona respondo kaptita

En kafejo sidas ĉe tablo franco kaj matenmanĝas. Antaŭ li taso da laktokafo, kornbulko kaj marmelado, kiam alvenas iu maĉgummaĉanta usonano kiu neniondirante aliras la tablon de la franco kaj sidiĝas. La franco ne atentas la alveninton, manĝas plu silente. Sed la usonanon tedas la silento do post iom da tempo, li alparolas la francon:

- Ĉu vi francoj manĝas la tutan kornbulkon?

- Jes, nature - respondas la franco moroze.

Post iom da silento la usonano elblovas la maĉgumon, poste turnas sin al la franco:

- Ni manĝas nur ĝian internon, la kruston ni kunkolektas en kontenero, prilaboras, bakas el ĝi kornbulkon kaj vendas al Francujo.

La franco senvorte manĝas plu. Post paso de novaj kelkminutoj, la usonano denove ekvoĉas:

- Ĉu vi francoj manĝas marmeladon al la kornbulko?

- Jes, memkompreneble! - venas la respondo de la matenmanĝanto.

- Ho, por matenmanĝi ni manĝas en Usono naturajn freŝajn fruktojn, kies ŝelojn ni kunkolektas en kontenero, prilaboras, por nova utiligo ni kuiras el ĝi marmeladon kaj forvendas ĝin al francoj.

- Kaj, kion vi faras per la foruzitaj kondomoj? - demandas la franco turnante sin al la usonano maĉgumomaĉanta.

- Ĉu ni? Ej, do, ni forĵetas ilin.

- Ho, ni ne! Ni kunkolektas ilin en konteneroj kaj por nova utiligo; ni fabrikas el ĝi maĉgumoj**n,** kiujn ni vendas al usonanoj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Sama firmao

Iu pastro sonoras ĉe domo. Pere de la pordotelefono eksonas virina voĉo:

- Ĉu estas vi, mia anĝeleto?

La pastro ridetante reparolas:

- Ne tutvere, sed temas pri la sama firmao.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Medikamenta kuracado, tamen iom alie

Viztitas iu dikulo la kuraciston.

- Sinjoro doktoro**,** mi tre ŝatus maldikiĝi. Ĉu vi povos iel helpi?

- Jen, estas ĉi tie cent piloloj, prenu ĉiutage! - respondas la doktoro.

- Ĉu mi alprenu la tutkvanton po 100 tage? - demandas mirante la dikulo.

- Ho, ne! Disŝutu la pilolojn en la ĉambro ĉiutage, poste kunprenadu ilin!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Frapa respondo

Kuracisto ekzamenas malsanulon, poste jene alparolas tiun:

- Diru, sinjoro, kion vi ŝatas plie: ĉu la virinojn aŭ la vinon?

- Ĉio dependas de la devenjaro de la ...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Problemo de nano

Iu nano vizitas kuraciston, ĉar doloras liaj orkidoj.

Malvestiĝu kaj ekstaru sur la ekzamen-tablon - ordonas la kuracisto.

La homo agas laŭ la devo. La kuracisto metas sian fingron sub la dekstran orkidon, kaj diras:

- Hm.

Poste li submetas sian fingron ankaŭ sub la maldekstran orkidon, kaj petas tusi. Poste li denove nur tion diras:

- Hm.

Post tio la kuracisto prenas grandan tondilon de la ilara ŝranko kaj sur ambaŭ flankoj li detranĉas ion. Pretiĝinte li diras, ke la paciento povos jam foriri.

La homo forte mirante spertas, ke li sentas jam neniun doloron, nun jam estas ĉio en ordo ĉe li.

- Sinjoro doktoro! Kion vi faris, ja al miraklo estas simila mia afero, ja mi sentis nenian doloron, kiam vi tranĉadis inter miaj femuroj! Kion vi faris pri mi?

- Mi detranĉis kelkajn centimetrojn el la supraj partoj de viaj gumbotoj! - aŭdiĝis la respondo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Surprizo

Du policistoj babiladas antaŭ la informa mapo de iu antaŭ nelonge malfermita magazeno. Unu policisto fingre almontras ruĝan cirklon sur kiu estas skribite: „Vi staras ĉi tie”. Li demandas **sia**n kamaradon:

- Hej! De kiu ili eksciis, kie mi estas?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Vivverecoj

- Se la piedmarŝado estus saniga, la poŝtistoj vivus poreterne.

- La baleno naĝas tuttage, manĝas nur fiŝon, trinkas nur akvon, tamen dikas.

- La testudo ne kuras, ne naĝas, ne saltadas, rapidas nenien kaj vivas 150 jarojn.

- La leporeto kuras, saltas kaj estas vegeterano, malgraŭ ĉio ĝi vivas nur 5 jarojn!

- Laŭ la statistikoj 24% de la akcidentoj de motorveturiloj kaŭzas tiuj, kiuj drinkas alkoholon. El tio sekvas, ke 76 %-ojn de la akcidentoj kaŭzas tiuj kiuj trinkas nur akvon, kafojn, refreŝigajn trinkaĵojn, lakton, energitrinkaĵojn kaj ceterajn senalkoholajn trinkaĵojn. Sekve de tiuj datumoj konstateblas, ke ĉi lastaj homoj estas trioble pli danĝeraj ol la alkoholdrinkantoj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Tri etapoj

Virinvivo dividiĝas al tri etapoj:

ŝi nervozigas sian patron
ŝi nervozigas sian edzon
ŝi nervozigas sian bofilon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Pensoj

Vivu loze, ne laboru tro multe, ĉar alikaze foje vi rimarkos, ke en la preĝejo ĉiuj kantas, nur vi kuŝas silente sur via dorso.

Pesimisto estas tiu homo, kiu ĉiam pravas, sed el tio neniam havas ĝojon.

La histerio estas insida malsano! La virino ricevas ĝin, sed la viro mortas pro tio.

La senscio ne estas fina stato, sed la idioteco jes.

La perfekta homo kapablas atendi multajn horojn, dum lia amikino pretiĝas dum du minutoj pri sia ŝminkado.

Kiu surmetas kuglorezistan veŝton ne surpriziĝu kiam li estas alpafita postaĵe.

La komputiloj neniam anstataŭos la homan idiotecon.

Ju pli maljunas la avo, des pli bone lernis li junaĝe.

Ne maltrankviliĝu pro via sano, ĝi pasos.

Dio certe amas la idiotojn se li kreis tiom multe el ili.

Kiu cigaredas, tabakas, pipfumas mortas. Kiu ne, ankaŭ tiu.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

En tombejo

Entombigatas iu homo. La pastro predikas pri la mortinto, kiel estinta bonega edzo, bonega patro.

La edzino al sia filino:

- Kara mia filineto, rigardu en la ĉerkon ĉu ni partoprenas la ĝustan entombigan ceremonion? Ja povas esti, ke ni venis ne al la ĝusta entombigo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Malobeo

Patrino demandas sian filinon:

- Kiam Jozefo kisis vin**,** kial vi ne ŝrikis?

- Ĉar kiam li kisis, mia buŝo estis okupita. Kiam li jam ne kisis, mi vidis jam nenian sencon por tio.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La mutulo

La bebo estis ridema, kaj ne tro plorema, bele progresis. Li iĝis ridema, ludema junulo, sed muta. Dum paso de la tempo lia familio jam alkutimiĝis, ke la fileto eĉ unu vorton ne parolas.

Je la 14a naskiĝtago de la fileto, por festi lin per festa tagmanĝo, alsidiĝis la familio al granda tablo. La supo estis metita en la telerojn kaj la familio komencis manĝi, kiam la mutulo ekstaris kaj ekkriis:

- Salon!

- Ho, mi estas ĝojega! Filo mia, ĉu vi scias paroli?

- Jes, mi scias.

- Kial vi ne parolis ĝis nun?

- Ĝis nun sufiĉe sala estis ĉio!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La justa envio

Du homoj klopodas hejmen ŝancel-irinte pro ebrio tra la kampo. Ili apudiras paŝtiĝantajn ĉevalojn. Rigardante tiujn, unu ebriulo alparolas sian amiĉjon:

- Ĉu vi povas imagi kiom mi envias ĉi bestojn?

- Kial vi?

- Ĉar ili povas iri kvarpiede.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La fridujo

Inter si babilantajn elementajn lernejanojn renkontas iu pli granda lernejano kaj demandas:

- El kio vi povas diveni, ke vian fridujon vizitis elefanto?

- Ni ne scias - respondas la du amiketoj.

- Nu, unue vi malfermu la pordon de la fridujo. Enrigardu! Se en la butero enestas la piedspuro de la elefanto, ĝi certe estis vizitinta ĝin!

(Fonto de la originala hungarlingva infanŝerco: kiralylajos.uw.hu)
(-- Trad: A.P.)

La parolantoj neatenditaj

Dum la 1950-aj jaroj iuj frapadis la pordon ĉe onjo Maria.

- Kiu estas tie? - demandis la dommastrino.

- Ni estas agitistoj.

- Kion vi volas?

- Paroladi.

- Kiom vi estas kune?

- Tri.

- Nu, tiam vi paroladu trankvile! - diris onjo Maria kaj fermis la fenestron, ne malferminte pordon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Stranga demando

Dum la rekrutekzameno la kuracisto alvokas junulon por deŝovi malsupren la gatjon kaj kliniĝi antaŭen. Tiu faras, la kuracisto rigardadas de malantaŭe, kaj post iom da tempo li faras la demandon:

- Ĉu vi havas truan denton?

- Kial, ĉu de tie videblas tio? - demandas la junulo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝereco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La farĉita brasiko

Iu homo ĉirkaŭ noktomezo ĝemante ellitiĝas, je kio la edzino vekiĝas kaj dormeme demandas:

- Pro kio vi suferas? Kien vi iras?

- Mi iros en la kelon por vino - respondas la edzo.

- Ĉu vi freneziĝis, ke noktomeze vi volas iri en la kelon por vino?

- Mi ne freneziĝis, sed antaŭ nelonge - sonĝante - mi manĝis tri pladojn da farĉita brasiko. Je tiu manĝaĵo mi devas trinki vinon, ĉar kontraŭe mi misdigestos pro naŭziĝo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Entrepreno

Du homoj paroladas. Dume unu notas:

- La nunaj gejunuloj estas maldiligentaj niatage. Ili ne entreprenas iri balon.

- Kial?

- Miatempe mi entreprenis iri balon eĉ je 15-kilometra distanco.

- Ĉu hejmenironte vi same entreprenis la piedmarŝon?

- Ne! La ambulanco portis min hejmen.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Asekuro pri vivo

Asekuron pri vivo volas estigi iu maljunulo, je kies apero en la oficejo la oficistino ege miras.

- Kara oĉjo! Kial vi volas estigi tiun asekuron pri vivo?

- Pro kio, nu, mi volas edziĝi.

- Kiomjara vi estas? - demandas la klientservistino.

- Cent du!

- Ĉu vi povus reveni post unu monato?

- Ne estos bone, ĉar tiam ni festos la naskiĝtagon de mia frato!

- Kioman?

- Li estos centdekokjara.

- Bone, revenu post duonjaro!

- Ho, ne, ankaŭ tiu tempo estos tre malkonvcena.

- Ĉu pro nova festotago?

- Jes, tiam okazos la geedziĝo de mia patro.

- Ĉu la geedziĝo de via patro? Kiom da jaroj havas via patro?

- Cent tridekokjara li estas.

- Kaj ĉu li edziĝas tiomjaraĝe?

- Jes, li devas, ĉar trudas tion al li liaj gepatroj...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La kapablo

Sepdekjarulo vizitas kuraciston kaj plendas:

- Sinjoro doktoro, la unua sukcesas, la dua jam pli malfacile, ĉe la tria mi jam sufokiĝas kaj ĉe la kvara mi devas jam halti ...

- Kara oĉjo, ne plendu, ja multaj homoj ĝojus por atingi la kvaran!

- Jes, jes, vere, sed mi loĝas sur la kvina etaĝo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Efiko de bromo

Du maljunuloj babiladas:

- Ĉu vi rememoras pri nia soldatservado? Ĉiun matenon oni metis bromon en nian teon, por ne deziri virinon.

- Jes, sed ĝi neniom efikis.

- Jes, tiam vere ne... ĝi nun komencas efiki.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Magazena aĉetado

En iu magazeno de Moskvo okazis, ke virino eniris por aĉeti virinajn subvestaĵojn:

- Mi petas mamzonon!

- Ĉi tie ni vendas neniun luksan varon.

- Ĉu vi eble vendas virinan subĉemizon?

- Eble estos sekvontsemajne.

- Ĉu vi havas virinan kalsoneton?

- Jes, sed unue bonvolu alporti atestilon, ke vi laboras sur eskalo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Agitfolio

Estro al dungito transdonis mansakon da flugfolioj por disvastigi. Poste pasis du tagoj, kaj la dungito ne revenis. Kiam fine li alvenis, la laborestro kolere demandis lin:

- Kie estis vi misŝanculo? Ĉu devis pasi tri tagoj por disŝuti agitfoliojn anstataŭ duhora laboro?

- Ho, por disdonadi ilin ja vere nur tiom da tempo necesas, sed por vendi ilin mi bezonis pli da tempo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La surdmutulo

Surdmutulo almozpetas en tunelo haltas antaŭ li unu virino, kiu ekkompatante la malfeliĉulon suspiras:

- Certe iu akcidento kaŭzis la surdmutiĝon de ĉi kompatindulo!

- Ho, ne sinjorino, mi jam naskiĝis surda.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Per kio preventi malsanon?

- Per kio eblas preventi kanceron?

- Pere de korinfarkto.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco presita Enigmo-kajero)
(-- Trad: A.P.)

Laborejo de edzoj

En iu laborejo la estro inklinas dungi nur edziĝintajn virojn. Kiam virino rifuzita demandas la estron pri ties kialo, tiu respondas jene:

- Tial mi dungigas nur edziĝintajn virojn, ĉar ili kapablas plenumi eĉ dum ankaŭ granda premo, ili bone toleras se oni grumble krias al ili, krome ili estas kutimiĝintaj esti obeemaj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Medicina scienco

Iu homo vizitas la kuraciston kaj demandas:

- Kara sinjoro kuracisto, ĉu mi povas jam trinki brandon?

- Ne oĉjo Jozefo, mi malpermesis tion jam antaŭ du jaroj!

- Ĉu de tiam neniom evoluis la medicino?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Preĝo Patro Nia

Iu homo iras al pastro por konfesi pekojn. La pastro diras, ke pro la pekoj la homo preĝdiru 5 „Patro Nia"-jn. Nia homo dankas, poste adiaŭdiras:

- Ĝis revido! Dio estu kun vi!

- Ĝis, filo mia! - reciprokas la pastro la saluton.

- Ĝis revido! Dio estu kun vi! - salutas denove la terkulturisto.

- Ĝis, filo mia! - reciprokas la pastro la saluton.

- Ĝis revido! Dio ... - la saluton de la terkulturisto rompas la pastro kolerete demandante:

- Ĉu vi idiotiĝis, filo mia, jam triafoje saluti min?

- Hej, pastro mia, kial vi koleras? Se vi koleriĝis jam pro mia tria saluto, aŭdonte la kvin Patro Nia-jn kiel agos la Di-sinjoro?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Saĝe pensi pri kiela plenumo de estonta kutimo

Iu homo sciante, ke la indiĝenoj devos alkutimiĝi al la kutimoj de la migrantoj, diras al sia filo**:**

- Filo mia! Se estonte ankaŭ vi devos havi kvar edzinojn, serĉu tiun virinon kiu havas tri fratinojn! Tiukaze vi havos nur unu bopatrinon!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Dilemo

Du junuloj renkontiĝas. Unu el ili ŝajnas esti zorgoplena.

- Kial vi estas zorgopremata? - diras unu al la alia.

- Hej, ne demandu!

- Tamen diru al mi vian zorgon, vi malpeziĝos.

- Bone. Ĉu vi konas Saran Kuti?

- Jes. Kial?

- Morgaŭ ŝi edziniĝos.

- Kiu edzinigos ŝin?

- Se mi iros, tiam mi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Ĝemeloj

Freŝe ekpatriĝinta homo kuregante el la naskoĉambro, ĝojege diras al la apartenantoj:

- Ni havas ĝemelojn naskitajn.

- Al kiuj ili similas? - demandas iu familiano.

- Al kiu? Ho, unu al alia!

(Fonto de la originenalahungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La strangaĵo

- Jean! Gustumu ĉi tiun konjakon! Kian stranĝaĵon vi trovas ĉe ĝi?

- Tion, ke vi regalis min!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estas: Enigmo-gazeto presita)
(-- Trad: L.P.)

Malsatmorto

Du amiĉjoj renkontiĝas. Aristido demandas Tasilon pri ties ĉevalo:

- Saluton amiĉjo Tasilo! Kiel fartas via ĉevalo?

- Mi volis eduki ĝin por vivi kiel malriĉuloj.

- Kaj ĉu sukcesis? - demandis Aristido.

- Imagu, kiam ĝi estus jam alkutimiĝinta al la nemanĝado, ĝi tiam malsatmortis!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estis presita ŝercgazeto LUDAS MATYI)
(-- Trad: A.P.)

La tutcerta diagnozo

- Mi ne kapablas konstati la diagnozon precize - diras la kuracisto al la paciento - mi nur supozas la kaŭzon de la plendoj. Certe, ilia kaŭzo estas la alkoholo.

- Nenia problemo, sinjoro doktoro! Mi revenos, se vi estos jam sobra!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Demandoj

1, - Kiam diras ĉino: Bonan Tagon?

- Kiam li alproprigas Esperanton!

2, - Kio estas akvo?

- Ĝi estas tia senkolora fluaĵo, kio nigriĝas je efiko de manlavo.

3, - Kiel amindumas dromedaro?

- Vin mi bezonas kiel la pezan akvoplenan ĝibon sur mia dorso**!**

(Fontoj de la originala hungarlingvaj ŝercoj: presitaj kajeroj pri ENIGMOJ.)
(-- Trad: A.P.)

Kamenpurigisto

Iu skoto sidas apud la malvarma kameno. Neatendite, tra la kamentubo falas antaŭ lin rompŝtelisto, kiu estis certa, ke la domo estas neloĝata. Vidante tiun, la skoto senvorte iras al la telefono.

- Sinjoro mia, mi petegas ne voki la policistojn! - petegas la fremdulo.

- Kion vi pensas? Mi volis telefoni, ke la kamenpurigisto jam ne venu ĉi tien, ĉar vi jam plenumis lian laboron!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Loko por parkado malpermesita

Pastoro parkas en la interna urbo - kie parki estas malparmesite - ĉar aliloke li ne trovis liberan spacon. Li metas papereton al la ventŝirmilo:

- Mi ĉirkaŭiris dekfoje la tutan ĉirkaŭaĵon. Se nun mi ne povas lasi ĉi tie mian aŭtomobilon, mi maltrafos gravan renkontiĝon. Pardonu niajn kulpojn!

Kiam la pastoro pli malfrue reiras al sia aŭto li trovas punpapereton sur la antaŭglaco kun mesaĝo:

- Dekfoje mi ĉirkaŭiris la tutan lokon. Se nun mi ne skribas al vi unu punpapereton, mi perdos mian oficon. Ne konduku nin en tenton!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Sekureco

Pasaĝero ŝajnas esti tro nerva en la flugmaŝino. Lia sidnajbaro provas trankviligi tiun:

- Sciu, ke flugado estas multe pli sekura ol aŭtomobila veturado. Mia konato ĝuste hieraŭ mortis en sia aŭto.

- Kial? Kio okazis?

- Sur lin falegis aviadilo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Favora juĝo

La juĝisto proklamas favoran juĝon, laŭ kiu en la afero de kvarfoja bankrabo la akuzito ne kulpas. La advokato ĝoje gratulas sian klienton, je kio tiu embarase demandas:

- Mi ne tute komprenas la juĝon. Ĉu tio signifas, ke mi devas redoni la monon?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Dum kontrolado fare de polico

Dum kontrolado iu policisto alparolas huliganon:

- Kie estas via laborejo?

- Ĉi tie-tie.

- Ĉu entute vi laboras?

- Kelkfoje.

- Kion?

- Ĉi tion-tion, kiam kion.

- Mi arestas vin.

- Kiam oni lasos min libera?

- Pli malfrue-frue.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Dum la antaŭkristnaska granda purigado

Patrinjo dum la antaŭkristnaska granda purigado purigas ankaŭ la necesejon, kiam haltas tie ŝia kvarjara filineto:

- Kion vi faras, panjo?

- Karega mia, mi purigas la necesejon, ke ĝi estu bela, pura!

- Kial?

- Karega, vi scias, ke estos Kristnasko... kaj venos al ni Jezueto kun donacoj!

- Ĉu li fekos ĉe ni?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Rejuniĝo

Iun freŝedzon demandas lia amiko:

- Nu, kia stato estas esti junedzo?

- Mi rejuniĝis!

- Kiel tio povas esti?

- En la necesejo mi cigaredas kaj sekrete mi drinkas.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Multekosta operacio

- Sinjoro doktoro! Ĉu multekostos la operacio? - demandas la malsanulo kuŝanta sur la operacia tablo.

- Ne zorgu pri tio, lasu tiun aferon al viaj heredontoj!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Delfena saĝeco

Ĉu vi scias, ke la delfeno estas tiom saĝa besto, ke dum kelkaj tagoj ĝi ellernigas al homo, ke tiu alstaru sur la randon de la akvobaseno kaj ĵetadu fiŝojn al la delfeno?

(Fonto de la originala hungara ŝerco estas presita kajero de ENIGMOJ)
(-- Trad: L.P.)

Ĉasista sukceso

Avo, laŭdante sin, parolas al la nepo pri siaj ĉasistaj sukcesoj.

La nepo alparolas la avon:

- Avo! Ĉu ankaŭ ĉi leonon surmuran vi murdis? Kiel vi faris?

- En la alta herbo mi ekvidis ĝin kuŝanta malantaŭ arbedo. Mi surgrimpis kaj per unu tranĉilo mi murdis ĝin.

- Kaj kie estas ĝia kapo?

- Kiam mi trovis la leonon, ĝi estis jam senkapa.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La bopatrino

- He, Deziderio! Kiu estas via bopatrino? Ĉu dekstre de la birdotimigilo estas ŝi aŭ de ĝi maldekstre?

- Meze!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estas presita kajero de ENIGMOJ.)
(-- Trad: A.P.)

Saĝa infano

Sesjara knabeto demandadas sian patron pri la naskiĝo de bebo:

- Patro, mi scias jam, ke bebo naskiĝas el la abdomeno de sia panjo. Sed kiel iras la bebo en ĝin?

La patro pensadas, poste komencas balbuti... poste embarase klarigadas malklare la afereon.

- Je tio la sesjara Steĉjo trankvilige diras al la paĉjo:

- Bone paĉjeto! Vi ne devas eltrovi ion, se vi ne scias pri la respondo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Preskaŭ

Steĉjo ricevas atentigan leteron de la instruistino al liaj gepatroj:

- Stefaneto hodiaŭ preskaŭ rompis fenestron de la koridoro.

Leginte la leteron, la patro respondas:

- Mi preskaŭ mallaŭdis lin pro tio.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Reklamo de lavpulvoro

- Vidu, kiel bele blankiĝis ĉi tiu ĉemizo.

- Jes vere, sed al mi ĝi pli plaĉis kvadratita.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Helpilo

Infano hejme turnas sin al sia patro:

- Patro! En la lernejo por helpi nian lernadon uzatas PC, Mp3, Saĝtelefonon. Kion vi uzis?

- Ĉu ni, kara filo mia? Ni uzis NIAN MENSON!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kiun elekti

Blondulino ekzameniĝas. Unu demando el la pluraj:

- Se el inter la plej grandaj pensantoj de la 20-a jarcento vi devus elekti iun eminentulon por priparoli, estu tiu homo vivanta aŭ jam mortinta, kiun vi elektus?

La blondulino post ioma pensado respondas:

- Nepre la vivantulon.

(Fonto de la origine hungarlingva teksto: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Libera tempo

La oficeja ĉefo turnas sin al sia juna sekretariino:

- Diru al mi, fraŭlino Helena**;** ĉu vi havas ian programon por hodiaŭ vespere?

La sekretariino ruĝetiĝinte respondas:

- Ho ne, sinjoro ĉefo.

- Bone Helena, tiam bonvolu frue enlitiĝi kaj satdormi, ĉar mi jam tre tediĝas, ke vi malfruiĝas ĉiutage.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Nuptonokto

Dum la nuptonokto la novedzino konfesas al sia edzo:

- Ho, Steĉjo, mi havis jam ankaŭ alian viron antaŭ vi.

- Ne gravas, kara mia, ankaŭ mi havis.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Antaŭ dogankontrolo

En la aerhaveno kun dek kriegantaj infanoj staras la gepatroj antaŭ la dogankontrolo. La dogankontrola oficiro demandas la familiestron:

- Ĉu estas ĉe vi manpafarmilo, pika-tranĉa ilo aŭ narkotaĵo?

La familiestro iom nerve:

- Kredu min**,** se mi havus, antaŭ longtempe mi estus ĝin jam uzinta.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Parlamento

- Ĉu vi scias kial estas kupolo sur la parlamento?

- Neniu vidis ĝis nun plattegmentan cirkon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Plendo

Post dekkvinjara geedzeco la paro iras kune al psikologo, kie la virino komencas vicigi siajn plendoj kaj ploregante parolas al la fakulo pri siaj diversaj problemoj estiĝintaj dum la lastaj 15 jaroj. Ŝi nur parolis kaj parolis ne haltigeble pri: la malzorgeco, neglektado, manko de intimeco, malpleneco, sento de soleco, manko de amo kaj longa listo de frustraciaj emociaj pretendoj nekontentigitaj, kiujn ŝi devis suferi en la ĝis nuna etapo de sia vivo. La fakulo ekstaris, ĉirkaŭis la tablon, iris al ŝi, al si brakumis la virinon kaj albuŝigis flaman kison. La virino senvorte sidiĝis, silentiĝis kvazaŭ ŝi estus narkotita.

La psikologo turnis sin al ŝia edzo:

- Ĉu vi vidas? Tiel oni devas fari po tri fojojn en semajno. Ĉu vi povos?

La edzo pensadis iom, poste jene respondis:

- Nu, en lundoj kaj merkredoj mi povos porti ŝin ĉi tien, sed ĉiun vendredon mi iras por fiŝhoki.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Kravato

En la dezerto afgana rifuĝinto preskaŭ jam senrezulte provas trovi akvon, kiam en la malproksimo li vidas iun homformon. Do li iras tiudirekten por peti de tiu homo akvon. La renkontita viro sidas en la sablo. Ekvidinte la alvenanton, la sidanta judo ekstaras por saluti lin kaj proponas, ke la rifuĝinto aĉetu de li kravaton. La rifuĝinto preskaŭ anhele diras:

- Mi ne kravaton, sed akvon petas por trinki.

- Akvon ne, nur kravaton mi havas. Aĉetu almenaŭ unu.

- Mi ne volas aĉeti ĝin. Ĉu vi scias, kie mi povus trinki akvon?

- Jes! Ĉu vi vidas dekstre tiun sablomonton? Malantaŭ tiu vi trovos gastejon kaj en ĝi bonan elegantan restoracion provizitan per bonega glacimalvarma mineralakvo je via dispono.

La rifuĝinto dankas pro la konsilo**,** kaj foriras. Je vespera sunsubiro li revenas mortlace apenaŭ povanta jam paŝadi kaj spiri, kaj diras al la nun aperanta kravatvendisto:

- Terure! Via frato ne lasis min eniri sen kravato!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La ora kolĉeno

Du mafioĉefoj renkontiĝas; la sicilia kaj la rutena. La sicilia diras al la alia:

- Ĉu vi havas 4-etaĝan domon?

- Ne, mi ne havas - venas la respondo de la aliulo.

- Nu, tiukaze vi ne estas vera mafiulo!

- Ĉu vi havas nigran limuzinon?

- Ne, mi ne havas.

- Nu, tiukaze vi ne estas vera mafiulo!

- Ĉu vi havas oran dikan kolĉenon pezantan unu kilogramon?

- Ne, mi ne havas.

- Nu, tiukaze vi ne estas vera mafiulo!

Hejmenirante la rutena mafiulo kolerege kriegas al siaj servantoj:

- De la ses etaĝoj subeksplodigu du! La oran kolĉenon de la hundo de nun mi portos!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Elekto de profesio

Filo de kuracisto volas fariĝi same kuracisto. La junulo konsilon petas de sia patro, kiun profesion elekti.

- Filo mia, mia kara ido! Elektu la fakon dermatologo.

- Kial?

- Unue tial, ĉar dermatologo nokte neniam estas invitata al malsanulo.

Due tial, ĉar pro dermatozo neniu mortis ĝis nun.

Trie tial, ĉar neniu resaniĝis el ĝi tiom, ke vi ne estu denove bezonata.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Embarasite

Dum ekzameniĝo iu studento scias nenion. Vane venas la demandoj, li povas respondi pri neniu. Fine li jene turnas sin al la profesoro:

- Sinjoro profesoro, mi eĉ tion ne scias jam ĉu mi estas viro aŭ virino.

La profesoro al la ekzamenato:

- Iru en la necesejon por ekscii!

Al la propono la ekzamenato:

- En kiun necesejon mi iru?

Li sukcese finis la ekzamenon estante tralasita.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Svatiĝo

La maljuna vidvino kaj la maljuna vidvo jam kvin jarojn regule renkontiĝis, serĉante okazon esti en la societo unu de la alia. Fine la vidvo decidas peti la vidvinon esti lia edzino.

Kiam li plenumas la geedziĝproponon, la vidvino tuj jesas. Poste ambaŭ hejmeniras, sed ĉiu aparte. Alitage la vidvo jam ne scias ĉu la virino jesis aŭ ne, tial li vokas ŝin telefone por demandi.

- Ho, tre bone estas, ke vi vokis min, ĉar mi ne scias jam al kiu mi diris jeson! - respondis la vokito.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La trovita mono

Ekde la infanaĝa amo kunrestinta paro festis la 50-an geedziĝan datrevenon kiam ili decidis viziti sian lernejon kie ili enamiĝis. Ĉe la hejmeniro de tie antaŭ ilin falis sako da mono el iu monoportanta aŭtomobilo. La geedzoj kalkulis la monon hejme. Ensake estis 50 000 dolaroj. La edzo diris, ke ĝin ili devas redoni, la edzino diris, ke ne, ja tio estas trovita mono. Sed, alitage jam policistoj vizitis la tiulokajn domojn serĉante la monon. La edzo diris, ke jes, ili trovis la monon, nur lia edzino kaŝis ĝin en la subtegmentejo. La edzino klarigis:

- Mia edzo estas jam iome senila.

La policistoj petis la edzon rakonti kiel okazis la montrovo. La edzo komencis la rakonton:

- Kiam mia edzino kaj mi kiam venis el la lernejo ...

Aŭdante la komencon, la du policistoj rigardis unu la alian, poste ili eksaltis, kaj dirante, ke ili nenian farendaĵon havas plu ĉi tie, ili salutis kaj foriris.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Kolero

- Nun, ke via edzino koleras vin kaj ne parolas al vi, kiu vekas vin ĉiumatene?

- Ŝi.

- Kiel?

- Ŝi ĵetas la katon sur mian liton ĉiumatene.

- Ĉu la kato vekas vin per miaŭado?

- Ne, en mia lito dormas la hundo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Ruino

Patro kaj filo promenas en la regiono de ruina kastelo. Ĝiaj muroj apenaŭ staris, ĉie videblis la ruinoj de la kastelo. Rigardante ilin, la infano demandas:

- Patro! Ĉu panjo ĉi tie lernis aŭtostiradon?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Bigamio

La jurfaka studento ekzamenate ricevas la taskon paroli pri bigamio. Li bone plenumas la taskon, kiam venas la sekva demando:

- Kio estas la puno de bigamio?

- La du bopatrinoj!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Du kunligaj vortoj

En la parko fraŭlo amtenere trabrakumas fraŭlinon:

- Karulino, diru al mi almenaŭ du vortojn, kiuj kunligos nin por eterno!

- Mi gravedas.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Inter si amikoj

Inter si amikoj:

Kiel sukcesis via ekzameno pri aŭtokonduko?

Mi ne scias, ĉar kiam mi eliris de tie, la ekzamenkomisiito ankoraŭ ne rekonsciiĝis.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Florvendisto

Iu florvendisto tre volas enspezi monon per vendo de la florstoko kaj diras al la supozata aĉetonto:

- Aĉetu ĉi florbukedon al via edzino!

- Mi ne havas edzinon.

- Aĉetu al via amatino!

- Mi ne havas amatinon!

- Aĉetu tiam por vi mem por festi, ke vi estas feliĉulo!

(Fonto de la originala hungarlingva serĉo: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La skota patrino

Skota infano kuras al sia panjo:

- Panjo, iu viro staras antaŭporde!

- Kion li volas?

- Li monon kolektas por estigo de naĝohalo.

- Kion mi donu al li?

- Duonsitelon da akvo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Estas tre malvarme

- Jean! Tre malvarme estas en la ĉambro. Kiom da gradoj estas ĉi tie?

- 16 gradoj, sinjoro mia!

- Kaj ekstere?

- 5 gradoj, sinjoro mia.

- Bone, malfermu la fenestron kaj lasu enveni ankaŭ tiujn 5 gradojn!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Freŝnovaĵoj

- Jean! Kial vi metis la gazeton en la fridujon?

- Tial, ke la novaĵoj restu freŝaj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Verda kaj kvakas

En la infangardejo la infanoj ricevas la demandon:

- Kio estas: surarbe sidas, verdas kaj kvakas.

- ???

Anoncas sin por respondi knabeto:

- Ĝi estas verda-jaka sciuro lernanta fremdan lingvon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Pri blondulino

Aŭtonstirantan blondulinon haltigas policisto:

- Haltu, sinjorino! Vi surveturis kvar homojn!

- Kial? Kiom estas permesite?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En ĉasado en Afriko

Geedzoj iras por ĉasado. En la celloko ili paroladas inter si. La blonda edzino diras:

- Antaŭ ol vi diras malveron pri mia ĉaskapablo, estu certa, ke via scio estu perfekta!

La edzo respondas:

- Ĝuu la vivon, ja vi havos multegan tempon por esti mortinto!

Post nelonga tempo la edzinon komencas ĉirkaŭiradi grandega virgorilo. Ŝajne ĝi havas fortan pariĝemon. La virino, anstataŭ pafo, kuras de antaŭ ĝi kaj grimpas sur arbon. La gorilo post ŝi grimpas. La virino senespere kriadas al sia edzo:

- Adalberto, faru jam ion! La gorilo volas min seksperforti!

La edzo ridegante:

- Nu, al ĉi tiu vi provu ekspliki, ke vi havas kapdoloron!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Bopatrino

Bopatrino fanfaronas en la ĉeesto de la bofilo:

- Mia bofilo estas tiom bona, ke li portas min ĉien.

Je kio la bofilo:

- Jes panjo, vi pravas, sed bedaŭrinde vi povas hejmenveni de ĉiu loko.

(Fonto de la originala hungara ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La opinidirado

Mi proponas al miaj bonvolantoj: se ili ĉesigos mensogadon pri mi, mi ĉesigos verdiradon pri ili.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Vetero

La avino demandas la edzon:

- Kion vi pensas, ĉu mi surprenu mamzonon?

La avo rigardas longe sian edzinon kaj post la pensado li rimarkigas:

- Do, sufiĉe multa koto estas ekstere.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Mi ne estas maljuna

- Hodiaŭ kiam mi ellitiĝis, - diras unu kato al la alia - levis miajn brustajn piedojn, mi movis miajn genuojn, turnis mian kapon kaj ĉe ĉiu movo mi aŭdis: krak. El tio mi venis al la firma konvinko ke mi ne maljunas, nur estas krakanta.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Lasta volo

Tri viroj paroladas inter si. La unua diras:

- Kiam mi mortos, bruligu min.

La alia diras:

- Kiam mi mortos, entombigu min.

La tria diras:

- Mi tiom drinkis, ke kiam mi mortos, oni enboteligu min.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Mineralakvo

- En la vendejo mi vidis sur botelo de mineralakvo, ke ĝi estis 4 milionojn da jaroj subtere, sed ĝia garantio pri uzebleco finiĝos post du semajnoj.

- Kion vi pensas pri tio, ke ĝi estis bone uzebla sub la tero dum kvar milionoj da jaroj, sed se mi aĉetas ĝin, post du semajnoj ĝi jam malboniĝos? - demandis la maljuna hungaro elveninte de la butiko.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La unuafoja fluganto

Virino, veturanta unuafoje per aviadilo, demandas la stevardinon:

- Diru, kara, ĉu la flugmaŝino havas paraŝutojn por ĉiuj vojaĝantoj?

Je tio la stevardino:

- Tre maloftas, ke flugmaŝino falegus, tial ni ne tenas paraŝutojn.

- Nu, ankaŭ la ŝipoj malofte dronas, tamen ili havas savboatojn... kvankam mi pensas, ke pli malmultaj homoj povas flugi ol naĝi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Fulmotondro

Du blondulinoj babiladas inter si:

- He, mi ne komprenas kial mi vidas multe pli frue la lumon kaj nur multe pli malfrue la fulmotondron. Ĉu vi scias kial?

- Vi stultulino! Ĉu vi ne pensis pri tio, ke viaj okuloj estas pli antaŭe ol viaj oreloj?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Parlamentaj deputitoj

Deputitoj ambaŭflankaj revenis el fiŝhokada ekskurso, kiam la boato likiĝis.

Rimarkante la brecon, la maldekstraflankuloj diris:

- Feliĉe, ke la brecо ne estas niaflanke.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Monamo

Staras antaŭ la spegulo malbela kaj maljuna sed riĉa politikisto.

- Kiome mi malbeliĝis en mia maljunaĝo! Mi estas hepatmakula kaj sulka - li pensas.

Kiam li forturnas sin de la spegulo kaj ekvidas sian belan kaj junan edzinon, li sentante bedaŭron, suspiras:

- Ne miru, ne miru, maljunulo, ĉar la monamo havas grandan potencon!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Pensokuradoj

1/ Idiotoj kaŭzas streson. Streso kaŭzas depresion. Depresio kaŭzas fizikan malsanon. El ĉio ĉi sekvas, ke mi devas eviti renkonton kun idiotoj, ĉar kontraŭe mi malsaniĝos.

2/ Tiuj esprimoj per kiuj ni karakterizas iujn, ne multe diras pri ili, sed multe diras pri ni mem.

3/ Je kiam la homo malkovras, ke lia patro pravis, antaŭ li staras lia filo kaj ne kredas lin.

4/ Ankaŭ la viroj havas sentojn. Ekzemple: ili ĉiutage malsatas.

5/ Se iu viro diras, ke li faros, li certe faros! Nu, tute superfluas duonjare memorigi lin pri tio.

6/ De la tento vi nur tiel povas liberiĝi, se vi lasos vin delogi.

7/ Edziĝinta viro povas forgesi pri siaj eraroj; superfluas pere de du homoj enmense teni la samon.

8/ Kiu naskas, ricevas amon. Se estas kiun prizorgi, estas kiun ami.

9/ Iu skribis al mi, ke brando bonas al purigado. Tio funkciis. Ju pli mi trinkis, des pli ŝajnis malpura la loĝejo.

10/ En la malnovaj tempoj ankoraŭ en la hospitalo oni diris pri iu, ke tiu estas knabo aŭ knabino. Nun oni devas atendi la plenkreskiĝon, kiam la junulo decidas esti viro aŭ virino.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Fabrikon vizitante

La universitataj studentoj vizitas viandaĵojn prilaborantan fabrikon. Maljuna fakulo montradas la maŝinojn kaj klarigas la procezojn:

- Karaj junaj kolegoj, la tuton vi imagu tiel, ke ĉi tie eniras bovo, kaj ĉe la fino elvenas kolbaso.

Iu junulo provas ŝerceme turni sin al la fakulo:

- Kara frato mia, ĉu tia maŝino ekzistas, ke ĉe la komenco eniras kolbaso kaj ĉe la fino elvenas bovo?

- Kial ne estus? - demandu vian patron ...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La trovita kolĉeno

- Kara mia, kian belegan kolĉenon vi havas! De kie vi aĉetis?

- Ne estas aĉetita, mi trovis ĝin sur la lasta sidloko de via aŭtomobilo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

En la preĝejo

Iu junulo vizitas preĝejon, volante konfesi.

- Mi havas grandan pekon, mia patro - diras li al la pastro.

- Hm, ĉu nur unufoje aŭ plurfoje vi pekis?

- Pastoro mia, mi venis konfesi kaj ne fanfaroni!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Du lokomotivstirantoj inter si

Du lokomotivstirantoj babiladas. Diras la germana:

- Ĉe ni la trajnoj iras tiom rapide, ke kiam mi volis vangofrapi la staciestron, la alia ricevis.

Je tio diras la sikulo:

- Ĉe ni la trajnoj iras tiom malrapide, ke kiam mia bofrato volante memmortigi sin kuŝiĝis sur la relparojn, li malsatmortis.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Patro kaj filo

Patro kaj filo plugas sian maldikan kultureblan agron. La patro kondukas la plugilon, la filo la ĉevalon. Dum la plugado la soko ofte elsaltas de la krude malmola tero, je kio la patro grumble diras:

- Kial vi ne tenas pli forte la plugdirektilon? Ja vi malbonigas la plugadon!

- Ne mi eraras, sed vi, kara mia patro!

- Kio? Vi kuraĝas paroli spite? June, viaaĝe mi ne kuraĝis repliki al mia patro! Kiel vi parolas al la via?

- Ĉu havis vi eĉ tian patron?

- Jes, pli bonan mi havis ol vi!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

En Sikullando

Post la dua mondmilito el la urbo Braŝo ĵurnalisto vizitis sikulan familion, kies ĉefo laboris kiel hakisto. La ĵurnalisto:

- Mi aŭdis, ke vi laboris kiel hakisto en la arbaro de la grafo, kaj vi povis konstrui nur ĉi tiun etan domon. Kiom da pantalonoj vi havis tiam?

- Ok.

- El kio?

- El tola teksaĵo!

- Kaj nun en la nova politika sistemo kiom vi havas?

- Du.

- El kio?

- El tiuj ok.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La fiŝhokisto

Iu homo sidas sur la bordo de rivero, super li sunombrelo, la hoko en la akvo bastonfine kun lumbriko. Venas malrapide promenante alia homo rigardanta la naturbelaĵojn de la akvobordo. Li haltas apud la sidanto kaj demandas:

- Ĉu la fiŝoj mordas? (Li pensis pri la fiŝmanĝaĵo.)

- Ho, ne! Karestuŝu ilin trankvile!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Vinakvo

Apud la vinakvo-fonto de la setlejo Homoród, haltis turistbuso. La veturantoj elbusiĝinte rigardas la maljunulon kiu plenigas sian ladbotelon per la akvo.

- De kiam vi portas de la fonto la akvon?

- Ekde kiam mi vivas.

- Je kio bonefikas tiu ĉi kuracakvo?

- Ĝi bonas kontraŭ soifo!

- Kaj ĝis kiam restas trinkebla ĉi acidakvo?

- Ĝis ĝi elĉerpiĝas!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Konkurso de belulinoj

El Rusujo oni anoncis, ke ankaŭ ĉi-jare aranĝatos konkurso pri belulinoj.

- Mi tre ĝojas, ĉar ankaŭ la pasintjara tre plaĉis. La tiama venkinto havis la plej belajn tri okulojn, kiujn mi vidis dum mia tuta vivo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estis: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Komence de diservo

La pastro mescelebras dimanĉe. Antaŭ ol komenci la celebron, li rimarkas, ke malbonaiĝis la mikrofono, pro kio li ekvoĉas:

- Malbona estas la mikrofono.

El inter la tie sidantaj kredantoj kiuj ne aŭdis bone **la** diron de la episkopo, pensante ke li komencis la meson, ili respondis la sekvantajn vortojn de la liturgio:

- ... kaj via animo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Kliento en la banko

- Mi ŝatus enpagi 100 000 forintojn, sed mi estas malkonfida.

- La banko garantias la deponaĵon.

- Kio okazos se la banko bankrotos?

- La agentejo kompensos pro perdo.

- Kaj kio okazos se ankaŭ la kompanio kaputiĝos?

- La landa registaro surprenas la respondecon.

- Kaj se ankaŭ la registaro nuliĝos?

- Ĉu vi ne taksus pli alte tion ol 100 000 forintoj, se okazus tiel?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Roso

Malrapide progresas antaŭen la ĉaro, la ĉevalo pene paŝadas. Iu policisto survoje haltigas ilin, pensante, ke eble portatas malpermesata vino por kaŝe vendi.

- Kion vi portas en tiu barelo? - demandas la policisto.

- Roso-sukon respondas la sikulo.

- Ĉu mi povas gustumi?

La terkulturisto mansignas jeson. La policisto malfermas la kranon de la barelo kaj trinkas unu gluton.

- Ho, sed ĝi estas terura! Iru plu!

- Hot, Roso!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

La juna advokato

La advokatdinastia juna posteulo finekzameniĝas eminente pri juro kaj manprenas la diplomon. Post kelkaj tagoj lia patro transdonas al li vastan pezan pakon kun tiu atentigo, ke la filo devos iri al la fina tribunala debato.

- Filo mia, estu lerta, ĉar ĉi tio estas la posedprena afero de gesinjoroj Kovaĉ - Sabo, kaj ĉi proceso daŭras jam dek jarojn!

Post la tribunala debato la juna advokato hejmenalvenas kun triumfa rideto survizaĝe:

- Mi gajnis la proceson!

- Kion vi faris?

- Jes, mi gajnis per unu sola lerta paŝo!

- Ĉu vi gajnis la proceson el kiu ni vivis dum dek jaroj, el kiu ni iris somerumi en eksterlandan somerumejon?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

La kuracista ekzameno

- Panjo, vi tion diris, ke la kuracista ekzameno de miaj dentoj estos sendolora, sed ne tiel estis.

- Kial? Ĉu doloris kiam la oĉjo doktoro rigardis viajn dentojn?

- Ne, por mi ne doloris. Li kriegis kiam mi mordis en lian fingron.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estas: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Kial dancas la anaso?

La cirkodirektoro iras en drinkejon kaj vidas, ke la gastoj kolektiĝas ĉirkaŭ unu tablo kaj ili ridas. Sur la tablo kuŝas plado, sur ĝi dancas anaso. Al la cirkodirektoro ekplaĉas la prezento kaj li aĉetas la anason kune kun la plado por dekmiloj da dolaroj pensante, ke li multe gajnos pere de tiu prezento. Sed, dum la unua cirka prezento la anaso ne volis danci, la direktoro suferis multajn mokkriojn pro tio. Poste kiam li trovis la anasvendiston, li atakis lin.

- Ho, vi fihomo! Vi vendis al mi anason kiu ne volas danci! Vi trompis min! Redonu mian monon!

Je la insulto p**ose**dinto respondis jene:

- Kara mia direktoro! Nekredeblas la tuto! Ĉu vi ne forgesis ekflamigi la kandelon sub la plado?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Ursa pelto

- Ĉu vi scias kial la urso havas pelton?

- Ĉu vi scias kiel ĝi aspektus en ledmantelo?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Peĉo

Ŝteliston demandas policisto:

- Vi kvarfoje estis por ŝteli en la sama butiko. Kiujn aĵojn vi forportis de tie?

- Nur unu robon al mia edzino, sed tri-foje ŝi ŝanĝigis ĝin pere de mi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Blindulon kondukanta hundo

Blindulo staras kun hundo ĉe fortatrafika vojkruciĝo, dum la lampo montrus ruĝan. La hundo jam perdanta paciencon ekiras kun la blindulo. Forta bremsokrako, aŭto preskaŭ surveturas ilin, sed lastmomente ĝi povas halti. Sed la malantaŭ ĝi venanta aŭto surkuras la trotuaron por halti tie. Nu, la paro tamen sukcesas sendamaĝe atingi la transan trotuaron. Tiam la blindulo donas kekson al la hundo. Iu fremdulo vidante la tuton, riproĉante demandas la blindulon:

- Kial vi donacas al hundo kondukanta vin preskaŭ morten?

- Mi volis scii kie estas ĝia kapo, por poste bone surpostaĵon frapi perpiede.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Longeco de unu minuto

La longecon de unu minuto determinas tio, ĉe kiu flanko de la necesejo ni atendas.

(Fonto de la originale hungarlingva ŝercdiro: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Rozo kaj burĝono

Surtrajne antaŭ la necesejo jam longe atendas viro. Li frapetas surporden, je kio virina voĉo respondas:

- Paciencon, mi venos post kelkaj minutoj!

La najbara necesejo estas same okupita, do post nelonga tempo la viro denove frapetas surporde kaj demandas:

- Kiam vi venos? Min urĝas mia afero!

Denove ekvoĉas la sama voĉo:

- Ĉu vi ne scias, ke pacienco produktas rozon?

- Mi scias, sed ĝia burĝono jam estas en mia kalsoneto!

Je tio aperas junvirino freŝe belŝminkita, ridetante.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: ne konatas.)
(-- Trad: A.P.)

Rigardantoj de subluaĵo

Juna paro serĉanta subluaĵon vizitas posedantinon, kiu prezentas komfortan malplenan ĉambron. Ĝi alloga estas kaj la edzo demandas la posedantinon:

- Bonvolu diri kiom da lumono ni devos pagi se ni entreprenos ekhavi du infanojn?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco el la jaro 1984: ludas-matyi.com/page/8/)
(-- Trad: A.P.)

Konto por egaligi la uzitan elektron

Du amikoj paroladas:

- Mi aŭdis, ke vi ricevis ĉekon pri duonmiliono da hungaraj forintoj por egaligi vian elektran konton.

- Jes, la historio de tiu misĉeko estas vera.

- Kian senton vi havis ricevante ĝin?

- Skuan, ŝokantan.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estas: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Nokte en la malliberejo

Sur koridoro de malliberejo en la mallumo flustras du homoj:

- De kiam vi estas ĉi tie?

- Ekde dek jaroj.

- Ĉu bone estas al vi ĉi tie?

- Ne!

- Ĉu vi inklinas rifuĝi kune kun mi de ĉi tie hodiaŭ nokte?

- Ne!

- Kial?

- Mi laboras ĉi tie.

- Ĉu vere? Kion vi faras?

- Mi estas provoso!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Ŝtontajlisto

Orfa knabo lernas por esti ŝtontajlisto. Kiam li finas la fakon, la majstro transdonas al li la dokumenton pri tio kaj atentigas lin:

- Iru al la sinjoro urbestro kaj bele danku al li, ke vi povis fini la ŝtontajlistan fakon!

La junulo obeas, kaj vizitante la urbestron, diras:

- Estimata sinjoro urbestro, mi estas tre dankema al vi, pro la eblo fini la ŝtontajlistan fakon! Mi ŝtontajlos al vi tian tombomonumenton, ke ĝis via vivfino vi neforgesos ĝin!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Brustharaj viroj

- Ĉu vi scias kial estas vilbrustaj viroj?

- La vilbrustaj viroj falis de la arboj, la aliaj deglitis.

(Fonto de la originale hungarlingva ŝerco: ne konatas.)
(-- Trad: A.P.)

Arteriosklerozo cerba

Kiam ekokazas la arteriosklerozo cerba:

- Esti aŭ ne esti ...

- Kio estis la demando?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estas: www.viccestapsi.com)
(-- Trad: A.P.)

Post matĉo

Post matĉo la trejnisto de futbalistoj alparolas iun sturmanton:

- Kara mia filo, vin nur du aferoj malhelpas, ke vi estu bona futbalisto!

- Kiuj?

- Viaj du piedoj!

(La originala hungarlingva ŝerco devenas de la presita Enigmo-kajero Kacagó)
(-- Trad: A.P.)

Svatiĝo

- Se vi, kara filo mia, edzinigos mian filinon, mi donos al vi kiel doton mian duonlandon!

- Kara patro, mi edzinigos vian filinon - diras Matiaso Ludaŝ al la reĝo - se en via duonreĝlando estas ankaŭ benzinstacio...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: ludas-matyi.com/page/3/)
(-- Trad: A.P.)

Sen virinoj

- Kio estus sur la Tero sen virinoj?

- Tutmonda ekvarmiĝo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco ne konatas.)
(-- Trad: A.P.)

Zorgado pri la homa korpo

Iru al kuracisto, certe troviĝos por vi malsano!!! / (Proverbo Vjetnama.)

Nun jam la medicinaj sciencoj estas tiom evoluintaj, ke niatage malofte mortas iu sen kuracista helpo. / (M. Kupecký)

Dum vivas la paciento pravas ĉiam la kuracisto, nur tiu nesentema prosektoro premas lin de ĉiuj flankoj per sia kontraŭopinio. / (R. Gordon)

Se la homoj parolus pli malmulte pri malsanoj, la homoj estus pli sanaj.

(Jean Anouilh)

La medicinscienco jam faris tiajn kapturnajn paŝojn, ke fakte ne troveblas sana homo! / (A. Huxley)

La nepacienca kuracisto estas kia la apendico: ne nur, ke li estas tuttempe en ekscitita stato, sed sialoke ankaŭ nenecesa. / (R. Koch)

Kelkfoje ŝajnas, ke la naturo sendas al la homoj nur mallongdaŭrajn malsanojn, sed la kuracistoj alproprigis la arton kiel longigi tiujn. / (M. Proust)

Sanaj estas nur tiuj kiuj ankoraŭ ne scias, ke ili estas malsanaj. / (D.Radovič)

Se la kuracisto prinomas vian malsanon, li scias jam kiun damaĝon vi havas. / (A.Bloch)

Ĉiu kuracisto kapablas elkuraci, almenaŭ de viaj iluzioj. / (J. Sekera)

Doktoroj kaj advokatoj konsistigas saman bandon**,** kun tiu diferenco, ke dum la advokato senhavigas vin de mono, la kuracisto helpas vin ankaŭ morti. / (A. P. Ĉeĥov)

Kiam okazis la operacio, neniu povos aserti, ke ĝi estis superflua. / (G. Bernard Shaw)

Sana estas tiu homo, al kiu ĉiutage aliloke doloras. / (M. Twain)

Sklerozo estas la plej bela morbo: ĝi ne doloras kaj ĉiutage vi sciiĝas pri novaĵo. / (Aurelius Augustinus)

La kuracistoj estas tre feliĉaj: ĉe iliaj sukcesoj brilas la suno, iliajn erarojn kovras la tero. / (Latina proverbo)

(Fonto de la originaj al hungara lingvo tradukitaj ŝercdiroj: forum.2esely.hu/gnm/index.php?topic=488.55;wap2)
(-- Trad: A.P.)

Sur la landvojo

Iu aŭto surtretis, mortveturis kokon sur landvojo. La ŝoforo post la akcidento portis la mortintan beston en la proksiman domon.

- Bonan tagon, sinjorino! Mi surtretis vian kokon, sed dezirus kompensi la damaĝon.

- Ĉio estas enorde, sinjoro! Mi petas vin iru al la fino de la ĝardeno, ĉar la kokinoj estas jam maltrankvilaj pro la manko de la koko. Krome ne forgesu kokokrii matene je la sesa.

(Fonto de la origine hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: L.P.)

Kaŭzo de malfruiĝo

Inter panjo kaj filo:

- Kara mia fileto Steĉjo, kial vi malfruiĝis hodiaŭ el la lernejo?

- Mi sonĝis pri piedpilka matĉo, sed pro tempolongigo mi devis dormi pli longe ...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

En la kuracista konsultejo

Je plendoj de iu virino, la kuracisto tre zorge observas ŝin sed trovante nenion gravan, diras:

- Pulmo, koro, gorĝo, sangopremo en ordo. Nun bonvolu montri tiun vian korpoparton per kiu vi virinoj miksiĝas en diversajn malbonojn.

La virino komencas malvesti sin. Je kio la kuracisto:

- Ne malvestu vin, sed vian langon montru!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Monpuno

Policisto haltigas aŭton kaj diras al la ŝoforo:

- Sinjoro, mi punas vin je 10 000 forintoj, ĉar vi veturis kontraŭ la veturdirekto en la unudirekta strato!

- Hu, ha! Mi havas grandan feliĉon, ja pasintsemajne ĝuste pro la samo estis forprenita mia kondukrajtigilo!

(Fonto de la origine hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Biblio-vendisto

Tri pastroj konkuris, kiu el inter ili povos vendi la plej grandan nombron da biblioj. El inter ili du estis tre lertaj, la tria estis malfeliĉulo, li estis balbutanta. Dum la unua tago unu pastro vendis 5 bibliojn, la dua 10, la balbutanta 25. Alitage denove la balbutanto vendis plej multajn bibliojn. Iu demandis ilin pri la kaŭzo, sed la unuaj du ne sciis. Tiam la demandanto turnis sin al la tria pastro por sciiĝi pri la kielo de la bibliovendado, kaj tiu respondis jene:

- Mi de-man-demandis, ĉ-ĉu Vi aĉ-aĉet-aĉetos aŭ m-i-mi v-voĉl-le-leg-voĉlegu ĝin?

(Fonto de la originale hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Anonco sur paĝo de gazeto pri hundoj

„Hundo estas aĉetebla. Ĝi ne estas elektema, manĝas ĉion. Ĝi ŝatas la infanojn.”

(Fonto de la hungarlingva ŝerco: https://www.viccesviccek.hu)
(--Trad: A.P.)

La plej timiga besto

La dombestoj konkursas, kiu el inter ili estas la plej timiga.

La porko diras:

- Mi enruliĝas en la koton, akre kriante mi kuregas ronde en la korto, ĉiuj kortbirdoj ektimas min.

La bovo diras:

- Mi eklevas la kapon, iom mi blovas kuregante sur la kampo, ĉiuj bovinoj kaj bovoj diskuras.

La kokino diras:

- Mi kondutas kvazaŭ mi estus mortinta. La duono de la lando ricevas lakson pensante, ke mi havas birdoinfluencon.

(Fonto de la hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

La bona feino kaj la najlo

Agresema malgranda porko promenante en la arbaro, renkontas la bonan feinon.

- Nu, agresema porketo, vi povos havi du dezirojn. Ilin mi plenuos.

- Bone. alfrapu en ĉi tiun arbon najlon tiel, ke neniu povi eltiri ĝin.

- Ej, vi petas ĉi tian simplaĵon? Jen! Kaj kio estas via dua peto?

- Eltiru!

(Fonto de la hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(-- Trad: A.P.)

Ruza Joe

En Sovaĝokcidento, vakero aliras drinkejon. Li mendas duoblan viskion kaj jene krias:

- Kiam Joe trinkas, ĉiuj trinkas!

La aliaj gastoj ĝoje kuregas al la tirinkejisto por la duobla viskio.

Jene okazas ĉi tio dum multaj rondoj, kiam fine Joe iras al la trinkejisto, sur la vendotablon li surĵetas la prezon de la propra trinkaĵkosto kaj jene krias:

- Kiam Joe pagas, ĉiuj pagas!

(Fonto de la hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(--Trad: A.P.)

La publika moralo

Du poŝoŝtelistoj babiladas:

- Vi ne povas imagi, kiom malboniĝis la publika moralo.

- Kio okazis pri vi?

Hieraŭ singarde mi metis mian manon en la poŝon de tre inteligentaspekta homo. Imagu, tiu fihomo tiom singarde detiris mian fingoringon de mia mano, ke mi ne rimarkis.

(Fonto de la hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad-- A.P.)

Flugantaj subtasoj

- Ĉu vi kredas la ekziston de la flugantaj subtasoj?

- Jes! - Ĉu vi vidis jam flugantajn neidentigeblajn objektojn?

- Ne, ekde kiam mi divorcis, jam ne!

(La fonto de la hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: --A.P.)

Alvenis via familio

Reire al la hejmo promenadas la geedzoj, sed ili kverelas jam delonge. Kiam ili atingas vojkruciĝon, aperas trupo de malpuraj, ebriaj viroj kun similaspektaj virinoj. La edzo ne povas lasi tion senvorte, kaj moke diras al sia edzino:

- Alvenis via familio ...

- Jes, mi rekonas ilin. Ili miaj gebopatroj estos ...

(La fonto de la hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Traktado pri divorco

Per kiu vi klarigas - demandas la advokato la edzon dum la divorca traktado, - ke vi ne parolis kun via edzino dum kvin jaroj?

- Mi ne volis interrompi ŝiajn vortojn.

(La fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Kredo

La pastro en la prizono demandas la kondamniton:

- Kial oni metis vin en la prizonon?

- Pro mia kredo.

???

- Mi ne nur supozis, sed kredis, ke kion mi faris oni ne malkaŝos**.**

(La fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Tra la tombejo

Iu homo tre timas spiritojn, tmen nokte li devas atingi la vilaĝon, trairante la tombejon. Singarde li paŝadas, kiam li ekaŭdas klakadon. Li rimarkas homon gravurantan surskribon sur ŝtono ĉe iu tombo.

- Hej, vi timigis min. Kion vi faras noktomeze ĉi tie?

- Ho ve! Oni mise skribis mian nomon, do tion mi ĝustigas.

(La fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Saĝdiroj

- La sperto estas bona lernejo, nur la instrupago estas alta.

- Vi estas saĝa, se vi kredas nur la duonon de la aŭditaĵoj...

- Sed vi estas geniulo, se vi scias, kiun.

- Ironio ne estas alia, ol ofendadoj de spirituloj.

- Fiŝosteto estas la venĝo de la fiŝo.

(La fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- L.P.)

Krevinta formiko

Maŭriceto ricevas novan brakhorloĝon, sed ĝi haltas post kelkaj tagoj. Li dispartigas ĝin. El ĝi defalas krevinta formiko. Maŭriceto eksuspiras:

- Mortis la mekanikisto.

(La fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- L.P.)

Ĉe la psikologo

Viro vizitas psikologon kaj diras:

- Sinjoro Doktoro, grandan damaĝon mi havas!

- Kio ĝi povas esti?

- Sinjoro Doktoro, mi imagas min kato.

- Ekde kiam vi imagas vin kato? -

- Ho, tiel depost mia aĝo de etkatido.

(La fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

La turdo instruas siajn idojn

- Ne nur la katon ni devas timi, sed ankaŭ la aŭtomobilojn. Hieraŭ ruĝa Opelo volis suriri ĉi tiun arbon!

(Fonto de la origina hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

La hirundoj kaj la kolombino

La hirundoj kaj la kolombino konstruas sian neston. La hirundoj konstruas ĝin metode, la alia faras nur improvize. Post paso de iom da tempo, la hirundoj alvokas la atenton de la kolombino, kiel ĝi konstruu la neston:

- Najbarino kara, atentu nin kiel ni faras ĝin kaj imitu. Aŭ ĉu vi tute ne scias kiel konstrui neston?

- Sed, mi sci-as, mi sci-i-as! Mi klop-o-das! - muĝetas la kolombino.

- Nu, se vi scias, se vi klopodas fari ĝin, do faru! - alvokis la hirundoj la najbarinon, kiu baldaŭ forflugis kaj nur nokte revenis.

Tial estas malorda la nesto de la kolombino, ĉar ĝi neniam ellernis la konstrumetodojn de la faro de la nesto.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: dokoro Ferenc Földi,
la patro de Adrienne Pásztor, el la jaro 1951-a.)
(Trad: -- A.P.)

Lipharoj

Iu viro diras al sia amiko, pensadante:

- Se tiuj malgrandaj lipharoj ne estus, vi tute tiel aspektus kiel mia bopatrino.

La amiko ofendiĝeme respondas:

- Kiaj lipharoj, ja mi tute ne havas ilin.

- Sed havas ilin mia bopatrino!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Kunkulpulo

Se vi helpas iun krimulon ĝuste tiam, kiam li faras la krimagon, vi estas kunkulpulo. Sed, se vi helpas lin post la krimago, do vi destas advokato.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Televidilo

Du taksio-ŝoforoj paroladas:

- Ĉu en via aŭtomobilo estas alarminstalaĵo?

- Nur, se mia bopatrino sidas en ĝi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Dum la abiturienta ekzameno

- Nu, kio okazis dum la abiturienta ekzameno? - demandas poste sian filon la krimulo.

- Ne ekscitiĝu - respondas la filo, ili insiste pridemandis min dum unu- kaj duon-horoj, sed vane, ĉar mi diris nenion.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Bonaj lernejaj kvalifikaj notoj

- Stefaneto, nuntempe ĉiam vi portas hejmen tre bonajn kvalifikajn notojn. Diru, kiu helpas?

- La televidilo. Ĝi malboniĝis.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Sur la ponto Petőfi

En Budapešto sur la ponto Petőfi ege malrapida estas la trafiko. Senpacienca pasaĝero alparolas la taksi-ŝoforon:

- Bonvolu diri, ĉu vi ne povus iri iom pli rapide?

- Mi povus, - respondas la ŝoforo - sed mi ne povas lasi ĉi tie la aŭtomobilon!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Privata detektivo

Privata detektivo ektiregas la pordon de taksio kaj demandas ĝian ŝoforon:

- Ĉu vi vidas tiun aŭtomobilon?

- Jes ja, mi vidas. Ĝi staras tuj antaŭ mi!

- Nu, iru! Sekvu ĝin!

- Kara sinjoro mia! Mi ne povus fari ion alian, ja ĝi remorkas min!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Sur la strando de nudistoj

La gardisto de la nudista strando al gasto:

- Kara sinjoro, en ĉi tiu blukolora kompleto da vestaĵo mi ne povas lasi vin aliri en la terenon de la strando!

- Pri kia blua kompleto vi parolas? Ĉu vi ne vidas, ke mi frostotremas?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

La diferenco inter la strandoj

- Kio estas la diferenco inter la normala strando kaj la nudista?

- Sur la nudista, ne ekzistas poŝoŝtelistoj.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Nokta gardisto

Unu gardisto la alian demandas:

- Nu, ĉu okazigis rezulton la aperigitaj anoncoj por dungo de nokta gardisto?

- Jes, ja! Grandan! - sonis la respondo. - Pasintsemajnofine oni prirabis la tutan firmaon!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Misvojigo de aviadilo

La kapitano de la aviadilo alparolas permikrofone la vojaĝantojn:

- Karaj damoj kaj sinjoroj! Mi havas unu malbonan kaj unu bonan novaĵojn, sed per kiu mi komencu?

- Nu, la malbona estas, ke aviadilrabisto etendis potencon al la aviadilo. La bona estas, ke li volas iri al Bahamoj!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Ĉampiono de la ŝtelistoj

Foje mi partoprenis en la mondĉampionado de la ŝtelistoj.

Mi sukcesis akiri la medalojn: oran, arĝentan kaj bronzan.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Individua loko

Aŭtovendeja komercisto diris, ke en mia nova aŭto 5 homoj prefere sen problemo povas havi sidejon por si. Nun jam la demando estas nur tio: en nia multproblema mondo, kie mi trovos 5 senproblemajn homojn?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Kio estas?

Kio estas tio, kio, se oni ĝin suprenĵetas, estas griza kaj ne refalas?

Muso sur Marso.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

La pesimismo

Vespere mi sentas min pesimisma ĉiam, kiam mi fermas la okulojn kaj ĉion vidas en malhelo.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Piediranto

Piediranto haltigas iun surstrate:

- Bonvolu pardoni, mi serĉas la fervojstacion.

- Mi ne koleras. Serĉu.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Kiam vi estos granda ...

La instruistino en la lernejo:

- Maria, kion vi faros, kiam vi estos tiom granda kiel mi?

- Mi daŭrigos terapion por iĝi svelta.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Ĉe la doktoro

- Sinjoro doktoro, kiam okazos mia operacio?

- La 10-an de aprilo, post kvin jaroj.

- Bone, sed je kioma horo?

- Kial gravas tio al vi?

- Ĉar je la 8-a horo venos la muntisto.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Bona ŝerco

Al la direktoro de la teatro iras figuranta statisto kaj riproĉas lin pro tio, ke li ne ricevas rolon, en kiu li dirus mallongan frazon, kontraŭ tio, ke li servas la teatron jam pli ol 10 jarojn.

La sinjoro direktoro trankviligas la statiston:

- Dum la hodiaŭa vespero facile plenumiĝos via deziro.

- Ĉu vere? - entuziasmas la statisto.

- Jes! Kiam, je la fino de la tria akto la purigistino elportas la glasojn, ne forgesu atentigi ŝin, ke ŝi bone, al bela brilado ellavu ilin.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco, la Észak Magyarország noma tagĵurnalo, Nro 01.januaro 1972.jara.)
(Trad: --A.P.)

Riĉeco

Foje, tre bonhava patro decidis, ke li portos al iu regiono sian 7-jaran fileton por montri la tiean malriĉecon de la homoj, kaj por ke la fileto de nun povu pli bone al taksi ilian riĉhavan vivon kaptante la esencon de la valoroj de la aĵoj ĉirkaŭantaj ilin hejme.

Ili pasigis unu tagon kaj unu nokton ĉe tre modesta vilaĝa familio en ilia domo. Poste la patro demandis sian filon:

- Kara mia filo, kion vi pensas pri ĉi tiu vojo?

- Paĉjo, ĝi estis tre bona!

- Ĉu vi vidis, kiel vivas kelkaj homoj en malriĉeco, multajn aĵojn tute ne havante en malriĉeco?

- Jes, patro.

- Kaj kion vi ekvidis el ĉi ĉio?

- Tion patro, ke ni havas unu hundon, ili havas kvar. Ni havas unu basenon, ili loĝas sur la bordo de lago. Nian ĝardenon limas barilo, sed la ilia estas senlima. Nian korton lumigas aro de lampoj, la ilian miliardoj da steloj lumigas per lumo. Mi vidis, ke ili havas tempon babiladi unu kun la alia, kaj tiel ili vivas kiel ĝoja familio. Vi kaj panjo la tutan tagon laboras, mi vidas vin apenaŭ. La patro silente ŝoforis, je kio la fileto ankoraŭ aldonis:

- Dankon paĉjo, ke vi montris al mi, kiel riĉaj ni povus esti.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Paskaj ovoj

- Panjo, ĉu veras, ke la leporetoj kovas la paskajn ovojn?

- Jes, tio veras, mia fileto.

- Kaj ĉu el tiuj ovoj kokidetoj eloviĝas?

- Jes.

- Ho! Kiaj moroj povas regi ĉe la leporoj!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Ej, nu tiam ...

Kiam estas la plej multaj plumoj sur la kokino?

- Kiam?

- Ej, nu tiam, kiam la koko estas sur ĝi.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Infandiraĵo

- Panjo, ĉu la koko ellasas ovojn?

- Ne.

- Ĉu ĝi ne volas aŭ ne povas?

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

La kokokrio

- Paĉjo, kial la kokoj kokokrias tiom frue, en frumateno?

- Kial?

- Ej, ili devas tial, ĉar se la kokinoj vekiĝas, poste la kokoj jam ne havos tempon pro la kokina vortamasigo!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco: www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Ĝi povis satiĝi

- Jean, ĉu vi satmanĝigis la papagon?

- Jes, sinjoro mia!

- Per kio?

- Per la kato.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco estas ne konata.)
(Trad: -- A.P.)

La naturo de la hundoj

Hundoj estas pli saĝaj, ol ni saĝaj homoj kredas. Al ili oni ne povas mensogi. Vortoj de hundo estas mem malkaŝa, sincera parolo. Nur homoj mensogas. Hundoj ne, ja ili ne uzas vortojn. Ili scias, al kiu ili ŝuldas dankemon.

Paŭlo Szász

La lupo

La lupo estas sankta, pure pensanta, honesta besto, viktimo de tia civilizacio kiu volas subigi la naturon.

Elli H. Radinger

Nia vera vivo

La mondo ŝuldas al vi per nenio, ĉar ĝi ekzistis jam antaŭ vi. Nur eta ero estas de nia vivo, kion ni faras aŭ kion ni diras. Nia vera vivo okazas en niaj pensoj, tiun ne mkonas alia, nur ni.

Gardu vin kontraŭ la nanoj!

Gardu ni sin kontraŭ tiuj, kiuj malgravigas niajn penojn, ambiciojn! La nanoj agas tiel ĉiam, dum la vere signifaj tion sentigas al ni, ke ankaŭ ni povas fariĝi tiaj.

La du trezoraĵoj

Ne neniigeblas du trezoraĵoj de eĉ unu nacio de nia planedo: la bonhumuro kaj la donaco de la bonvolo.

(La originalaj hungarlingvaj saĝdiroj devenas de:
https://www.citatum.hu/szerzo/Mark_Twain)
(-- Trad: A.P.)

Hazardo

La hazardo estas freneza, tamen laŭplana, sistema.

Stephen King

Ne ekzistas sameco. - Ĉu hazarde?

Ne ekzistas du samformaj sortolinioj, du samformaj manplatdesegnaĵoj, du samformaj fingropremaĵoj, ne ekzistas du samaj tagoj, ne ekzistas du samaj jarŝanĝiĝaj tagoj, du same okazantaj incendioj aŭ du samformaj inundoj.

Miklós Apáti

(La originalaj hungarlingvaj citaĵoj devenas de:
https://www.citatum.hu/kategoria/Veletlen)
(Trad: -- A. P.)

Opinion diras la estonta bopatro

Fraŭlino akompanas sian elektitan amikon al sia familio.

- Nu, kiujn planojn vi havas koncerne mian filinon?

- Post iom da tempo mi ŝatus edzinigi ŝin.

- Ĉu vi havas profesion, laborejon per kies salajro vi povos vivtenadi mian filinon?

- Nun, unue mi devas fini miajn studadojn, sed mi fidas Dion, ke Li helpos min.

- Ĉu vi havas domon en kiu vi duope povos loĝi, vivi?

- Ankoraŭ nun mi ne havas, sed mi fidas Dion, ke Li helpos nin.

Ĉi tiu demandado kaj respondado daŭris dum la tuta vespermanĝo. Post la vespermanĝo kiam restis solaj la gepatroj, la edzino demandas la edzon:

- Ĉu plaĉis al vi la fraŭlo?

- Verdire, kaj ne plaĉis li, kaj plaĉis. Ne plaĉis al mi ke li havas nenion, sed plaĉis ke li pensas min Dio.

(Fonto de la hungarlingva ŝerco devenas de:
http://www.topviccek.hu/vicc/Velemenyt-mond-a-leendo-apos)
(Trad: -- A.P.)

Ne estas vereco!

Mi devas konstati, ke en la vivo ne estas vero! La virojn kaj la virinojn ne samforme prijuĝas la juĝejo. Se en la somera varmego la viro tute nuda kuŝas en sia ĝardeno por sunbani sin, la najbarino denuncas lin pro ofendo de pudoro.

Sed se la najbarino faras la saman sunbaniĝon, la juĝejo prijuĝas la viron pro damaĝa, ofenda kaŝrigardado.

(Fonto de la originalahungarlingva ŝerco devenas de:
http://www.topviccek.hu/vicc/Nem-igazsag#ixzz7LWFxWyDw)
(Trad: -- A.P.)

La avino

La intruistino demandas Steĉjon en la lernejo:

- Kiel fartas via avinjo?

- Ŝi mortis.

- Tiu estas terura, kiel okazis?

- La trajno finiris ŝian etfingron.

- Sed de tiu neniu povas morti!

- Jes, sed tiu okazis tiam, kiam ŝi gratis al sia la dekstran orelon.

(La fonto de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/vicces_viccek&honnan=10)
(-- Trad: A.P.)

La gladilo

Kiam hejmeniras la edzo, lia blondharara edzino akceptas lin per tiu novaĵo, ke ŝi trabruligis la edzan pantalonon, ĉar ŝi forgesis depreni de ĝi la gladilon.

- Karega mia, respondas la edzo, nenia damaĝo estas, ĉar mi havas ankaŭ alian pantalonon.

- Sed el ĝi mi detranĉis la flikpecon al la granda truo!

(La fonto de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/vicces_viccek&honnan=10)
(Trad: -- A.P.)

Inter ni estanta

En la frenezulejo unu flegato volas kardiri al la doktoro:

- Ĉu vi scias, sinjoro doktoro, ni pli bone ŝatas vin ol vian antaŭulon.

- Ĉu vere? - demandas la doktoro - kial?

- Jes, ĉar ni sentas tiel, vi estas kiel unu de inter ni estanta...

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/Orvos_viccek)
(Trad: -- A.P.)

Natura morto

La kadavroj kontrolisto tion skribis sur la atestilo pri morto kiel kaŭzon de la morto de la batita homo, ke li mortis naturan morton. Kiam pro tio oni prirespondigis, li respondis:

- Ej, do tute nature estas ke li mortis, se li estis tiom batita sur la kapon.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco, devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/Orvos_viccek)
(Trad: -- A.P.)

Lakson havanta malsanulo ĉe kuracisto

- Sinjoro doktoro, kramfas mia stomako. Helpu! Tiam okazas ĉe mi pli malgranda, pli granda „akcidento” en la kalsoneton.

La doktoro dum telefonado, anstataŭ lakso-malhelpilo, donas recepton pri nervotrankviligilo. Post unu semajno kiam la malsanulo reiras al la kuracisto, li demandas.

- Nu, ĉu okazas eĉ nun „akcidentoj”?

- Jes, sed kial zorgi pri tio? - respondas la malsanulo per transmonda rideto.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/Orvos_viccek)
(Trad: -- A.P.)

Oni povus ŝakludi

Al plenplena aŭtobuso dum la enbusiĝo diras viro:

- Homoj, iru pli enen! Ene estas eĉ tiom de loko, ke oni povus ŝakludi!

Je tio alparolas iu homo:

- Venu trankvile, ja mankas unu peono!

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/Megtortent_viccek)
(Trad: -- A.P.)

Veturigado ĝis la lernejo

Maŭriceto diras al la ŝoforo de civila aŭtomobilo atendanta ĉe vojrando:

- Mi petas vin oĉjo, bonvolu porti min ĝis la lernejo.

- Mi ne iras tiun direkton.

- Pli bone estas tiel.

(Fonto de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
https://www.viccesviccek.hu/Moricka_viccek)
(Trad: -- A.P.)

Kio estas en la kiso de virino?

- 1% da lipruĵo, 9 % da sukero, 90 % da amelo.

Fonto: de la originala hungarlingva ŝerco devenas de:
(https://www.viccesviccek.hu/Kerdes-Felelet_viccek)
(Trad: -- A.P.)

Citaĵoj de la verkisto Géza Gárdonyi

1. Nia plej granda malamiko estas la kolero. Sed ne tiu, kiu atakas el la koro de aliulo. Kontraŭ tiu ni povas defendi nin. Sed la kolero nia, la propra.

2. La feliĉon ni povas eklerni en tiu lernejo, kie la nomo de la majstra instruisto estas: Sufero.

3. La unua kondiĉo de la surtera feliĉo estas: la laborigo de la volo, la klopodo al unu fiksa celo sen devio, sen fervoriĝo. Ĉar unu speco estas de feliĉo: vido de bone finita laboro, la sento de sukceso. Laboro montras: kio estas la valoro de homo.

4. La geedziĝo plejparte tial malfeliĉas, ĉar la virino forgesas, ke ŝi estas anĝelino. La viro eĉ tion forgesas, ke ŝi estas virino.

5. Kiam ni ridas, ni priridas aliulojn. Kiam ni ploras, ni priploras nin mem.

6. La verkisto kaj la ĵurnalisto diferencas nur en tio, ke la ĵurnalisto unue ekprenas la plumon kaj poste pripensadas, dum la verkisto unue pensadas kaj nur poste prenas la plumon por skribi.

7. Mono por aĉeto de libro ŝajnas kiel vane elĵetita semo, kiel semero.

8. Kion ajn vi havas, pri kio vi povas diri: ĝi estas mia, ne forgesu pensi pri ĝi: mi ricevis ĝin prunte. Ja ĉion vi ricevis prunte de la vivo, ĉion vi devos redoni.

9. La violono ne sonas de si mem, nur se la homa sento, la prudento eksonorigas ĝin, nur homo donas sencon al ĝi. Ankaŭ la homa korpo estas violono.

10. La bonŝancoj de la Imperioj Romia kaj Greka fondiĝis inter argilpotoj, sed subiris kiel la suno, inter oraj pladoj.

(Fonto de la originalaj hungarlingvaj saĝdiraj citaĵoj:
https://hu.wikiquote.org/wiki/Gárdonyi_Géza)
(Trad: -- A.P.)

La laksa rinocero

Laŭ vi kion oni devas doni al la rinocero havanta lakson?

????

Vojon!

(Fonto de la originala hungarlingva teksto: https://www.viccesviccek.hu)
(Trad: -- A.P.)

Laboreja fabelo:

Sidis korvo sur arbobranĉo kaj faris nenion. Tie iris leporeto kaj alparolis la korvon:

- Kamarado korvo ĉu ne ĝenos vin ke mi sidiĝu apud vin? Ĉu vi permesas al mi sidi same en la ombro?

- Kial ne? Sidu trankvile ĉi tie - diris la korvo kaj sprenflugis al alia branĉo.

La leporeto sidiĝis por malstreĉiĝi. Posttagmeze venis vulpo. Ĝi ekvidinte la leporeton, kiu loze sidis farante nenion, kaj formanĝis ĝin.

Kio estas la instruaĵo el ĉi tiu fabelo?

Tiu, kiu volas tutan tagon nur loze sidi faranta nenion, tiu devas sidi tre alte.

(Fonto de la originala hungarlingva teksto:
https://www.viccesviccek.hu/vicces_viccek&honnan=10)
(Trad: -- A.P.)

Disputo

Kuracisto, natursciencisto kaj politikisto disputadas kies profesio ekzistis pli frue. - La medicino ekzistas jam ekde la apero de la homaro - diras la kuracisto:

- La dinosaŭroj eskzistis jam antaŭ la homaro, antaŭ ili estis nur granda ĥaoso - notas la natursciencisto. Al kies noto alparolas la politikisto:

-Kaj kion vi pensas, kio kaŭzis tiun ĥaoson?

(Fonto de la origina hungarlingva deveno: https://vicc24.hu/politika-viccek)
(Trad: -- A.P.)

UFO-invado

La amerikan prezidanton lia konsilanto telefone vekas:

- Sinjoro Prezidanto, mi havas kaj bonan kaj malbonan novaĵojn por Vi!

- Dio mia! Diru unue la malbonan!

- De fremda planedo devenantaj estaĵoj atakis Usonon (La Unuiĝintajn Ŝtatojn de Nord-Ameriko!

- Sankta Dio! Kaj kio estas la bona famo?

- La bona novaĵo estas, ke ili manĝas ĵurnalistojn kaj pisas oleon!

(Fonto de la originala hungarlingva tekstodeveno estas: https://vicc24.hu/politika-viccek)
(Trad: --A.P.)

Karaj gelegantoj!

Ni, la kontribuantoj de la ekvivigo de ĉi tiu kolektaĵo esperas, ke vi bone amuziĝis, kaj rekomendos ĝian legon al aliuloj.

Honore al vi, gelegantoj, nianome:

Adrienne sinjorino Pásztor
el la urbo Miskolc,
Hungarujo

